

1981 aprilo

74-a jaro

n-ro 904 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Amadou-Mahtar M'Bow akceptis delegacion de UEA

Vi trovos

tiel ampleksan tekston pri "La kovrilo" ĉi-sube, ke apenaŭ restas spaco por diri al vi ion en ĉi tiu rubriko. Ne vere gravas, ĉu ne. Ni ofte parolas interlinie tra la tuta numero, kaj vi jam certe lernis legi ankaŭ tion. Hodiaŭ estas la 1-a de aprilo kaj en multaj landoj oni rajtas dum tiu tago blagi kaj ŝerc trompi la geamikojn. Ni nek faris nek farus tion kun vi. Ni traktis vin tute serioze kaj produktis honestan revunumeron, kun amaso da novaĵoj kaj atentindaj ideoj. Saluton de nia presisto, kiu atendas ĉi tiun numeron hodiaŭ! Ĝis baldaŭ!

Enhavo

- 61 Eksteraj rilatoj de UEA: Refortigo de la kontaktoj kun Unesko
- 62 Kunsido de la Estraro de UEA: Kiel mastrumi multnacionan entreprenon (S. Milojević)
- 63 Nekrologo: Atanas D. Atanasov (1892-1981)
- 64 Kulturo: Memornotoj pri kulturpolitiko (Baldur Ragnarsson)
- 66 Vizito al Ĉinio kaj Mongolio: Ĉinio bolas, Mongolio varmigas (Flóra Szabó-Felső); Reagoj: Ni almenaŭ provu! (Trevor Steele)
- 67 Esperanto-movado kaj handikapuloj: Agi unuavice home (W.F. Pilger)
- 68 Libromarkato: Libroj kostos pli en junio ĉi-jare
- 70 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 66a Universala Kongreso en Brazilo)
- 71 Por ke venu tiuj, kiuj ne povas (S.M.)
Recenzoj: "L'omnibuso kun la tri pasaĝeroj" de M. Miyamoto, M. Ueyama kaj E. Saito (K. Schubert); "Probablokalkulo" de O. Reiersøl (J.O. de Kat); "Lingvaj ludoj de GEJ" de E. Kuhl (H. Chapman); "Prilingvaj artikoloj de Ossaka" (W.A. Verloren van Themaat)
- 73 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 74 TEJO-Paĝo: Labortendaroj: Kie oni povas utili ferie? (S. MacGill)
- 75 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 77 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 78 Nekrologoj (D. Bujdosó, S. Chaler Arnau, M. Bonafous, A. Dratwer, R. García López, C. Gooch, H.J.A. Leijder, P.A. Jud, N.J. Matland, F. Merrick, M. Pavletić, B. Sabljčić)
Ekzameno E (Bernard Golden)
- 79 Anonco
- 80 Anoncetoj.

La kovrilo

Ni ne klarigos al vi ĉi tie denove, de maldekstre dekstren aŭ inverse, kiu estas sur la kovrila bildo. Rigardu la klarigon pri la foto sur la apuda paĝo kaj ĝi helpas al vi religi la nomojn al la kovrilaj vizaĝoj. Fakte, la kovrila bildo estas nur plia ilustraĵo por la teksto pri la akcepto de UEA-delegacio ĉe Unesko, pri kio parolas la teksto sur la paĝo 61. Nu, bedaŭrinde, kiam profesiaj fotistoj de Unesko faras bildojn pri akceptoj ĉe sia ĝenerala direktoro, ili metas en la unuan planon la gastojn. Ni ĉi-foje estus preferintaj vidi Amadou-Mahtar M'Bow, la ĝeneralan direktoron de Unesko, pli klare sur la kovrila bildo. Ĉar, se Esperanto estas "tabua" lingvo, kiel foje skribis Piron, tiam la ĝenerala direktoro de Unesko montras ankaŭ ĉi-foje, kaj denove, sian personan kuraĝon kaj sian intelektan superecon al tiuj, kiuj timas agnoski la valorojn de Esperanto. Amadou-Mahtar M'Bow ne surprizas nin per ĉi tiu ripeta paŝo de apogo al la Internacia Lingvo, ĉar ni jam delonge konsideras lin unu el la plej kuraĝaj kaj plej klarvidaj agantoj en la monda kultura (kaj ne nur) vivo. Fine, tiuj librofaskoj en la manoj de la homoj sur la kovrila bildo, tio ja estas la Esperanta kolekto de la Serio Oriento-Okcidento.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakvivilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado, landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176, Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.



Amika renkontiĝo en Parizo (de maldekstre): Grégoire Maertens, Emmanuel Chicot, Humphrey Tonkin, Barbara Despiney kaj Amadou-Mahtar M'Bow (Foto: Michel Claude)

EKSTERAJ RILATOJ DE UEA:

Refortigo de la kontaktoj kun Unesko

LA 17an DE MARTO, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow, akceptis en Parizo delegacion de UEA. En la delegacio estis Grégoire Maertens, prezidanto de la Asocio, Humphrey Tonkin, estrarano pri eksteraj rilatoj, Emmanuel Chicot kaj Barbara Despiney, reprezentantoj de UEA kaj TEJO ĉe la sidejo de Unesko. Kvankam ĉi tiu vizito ligiĝis al la 25-jara jubileo de la granda projekto de Unesko pri reciproka aprezo de la kulturoj de Oriento kaj Okcidento kaj tiurilata donaco al la Ĝenerala Direktoro de ĉiuj aperintaj volumoj en la Esperanta librokolekto sub tiu nomo, ni preferas aserti, ke la renkontiĝo ne havis iun specifan kialon. Temis simple pri renkontiĝo de la gvidaj funkciuloj de du internaciaj organizaĵoj, kiuj ĉiam pli kaj pli intime kunlaboras. Nia aserto ne celas forpreni ion de la graveco de ĉi tiu vizito. Male, la emfazo de ĝia spontana efektiviĝo emas substreki la esencan ŝanĝon, kiun dum la lastaj jaroj spertis la rilatoj inter Unesko kaj UEA. Kiel ni jam antaŭe atentigis, la rilatoj inter la du organizaĵoj jam delonge ne estas nur informaj kaj konsultaj, ili fariĝis kunlaboraj, je ambaŭflanka kontento.

La Ĝenerala Direktoro de Unesko estis evidente agrable surprizita per la kolekto de la Serio Oriento-Okcidento. Li atentigis, ke necesas pensi en simila maniero ankaŭ pri la reciproka aprezo de la kulturoj de

Nordo kaj Sudo. S-ro M'Bow diris, ke li daŭre aŭdas pri la progreso de Esperanto. Memorante ankoraŭ siajn spertojn dum la partopreno en la 62a Universala Kongreso en Rejkjaviko en 1977, la Ĝenerala Direktoro esprimis bedaŭron, ke li ne povos partopreni en la ĉi-jara Kongreso en Brazilio. Tien tamen venos lia speciala reprezentanto, kun persona mesaĝo de Amadou-Mahtar M'Bow. Fakte, la Ĝenerala Direktoro estos en Brazilio en aprilo ĉi-jare kaj li esperas renkonti tie ankaŭ esperantistojn.

Demandita pri opinio, kiel reliefigi la lingvan problemon en Unesko, s-ro M'Bow konsilis, ke tio okazu pere de la konstanta komitato de la neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko, kie UEA kiel ĝia membro gvidas ĝuste la laborgrupon pri komunikado. Montriĝis, ke la Ĝenerala Direktoro estas tre detale informita pri tiu laboro kaj ke li tre alte taksas la rolon, kiun la neregistaraj organizaĵoj ludas en Unesko.

Kiam la delegacio de UEA menciis la centjaran jubileon de Esperanto en 1987, s-ro M'Bow insistis, ke oni planu solenaĵon ankaŭ en la sidejo de Unesko, al kiu ankaŭ li persone venus.

Entute, ĉi tiu preskaŭ unuhora renkontiĝo disvolviĝis en aparte amika etoso. Denove pruviĝis, ke la Internacia Lingvo havas eminentan simpatianton en la personeco de la Ĝenerala Direktoro de Unesko.

Kiel mastrumi multnacian entreprenon?

MALPLI ol tri monatoj disigis ĉi tiun kunsidon, kiu okazis inter la 13a kaj 15a de marto 1981 en Roterdamo, de la estrara renkontiĝo en decembro 1980, pri kiu ni raportis en nia januara numero. La estraranoj apenaŭ havis la necesan tempon por digesti la protokolon pri la antaŭa kunsido, kaj jen nova kunveno. Ĉar la tagordoj de la estrarkunsidoj reflektas la aktualan problemaron de la Asocio, vi povas imagi, ke la situacio inter decembro kaj marto apenaŭ ŝanĝiĝis kaj, ke — sekve — la marta tagordo multrilate similis al la decembra. Entute, ĉi tiu kunsido ŝajnis esti daŭrigo de la decembra diskutoj. Kompreneble, ke ĉeestis la samaj homoj: ĉiuj ok estraranoj, kelkaj oficistoj de la Asocio kaj — tio estis ŝanĝo! — reprezentanto de TEJO estis nova vizaĝo — Ian Jackson el Britio. Tamen, ni ne ripetos ĉi tie la januanan raporton pri la decembra kunsido, sed ni ja provos verki kvazaŭ ĝian daŭrigon.

Post la pasintjara akcepto de la nova Statuto de UEA, pluraj regularoj de la Asocio bezonas renovigon. La ĝenerala inklinado de la Estraro estas funda revizio de, ekzemple, la Ĝenerala kaj Kongresa Regularoj. Oni eĉ volas diskutigi kiel eble plej vaste — verŝajne pere de nia revuo — fundamentajn konceptojn, kiujn devus enhavi tiuj regularoj kaj kiuj ne jam fontas el la Statuto mem. Sed, ĉar tiu laboro postulos multan tempon, estas decidite baldaŭ fari iaspecan teknikan adapton de la Ĝenerala Regularo al la nova Statuto. Temas do esence pri terminologia kaj simila akordigo de tiuj du bazaj dokumentoj de la Asocio.

Iam estis tute facile trakti la tagordan ĉapitron "Administrado". Tiam la Asocio havis la Centran Oficejon en Roterdamo kaj iun surpaperan Servan Centron en Svislando. Tiuj tempoj — kaj tiu facileco — ŝajnas esti definitive for. Nun la Estraro devas zorgi ankaŭ pri la oficejoj en Nov-Jorko, en Antverpeno, en Budapeŝto... Kvankam la Estraro neniam diskutas, ĉu unu el tiuj oficejoj bezonas novan balailon, restas sufiĉe da aliaj demandoj, almenaŭ teknike similaj al tiu de balailo, pri kiuj la Estraro ja devas decidi, ĉar ofte temas pri investo de konsiderindaj monsumoj. Ekzemple, nun estas faritaj la decidoj, ke la Grafika Centro en Antverpeno aĉetu novan fotokompostilon, kiu kostas kelkdek mil guldenojn, ke la CO en Roterdamo akiru elektronan pesilon (kelkmilo da guldenoj), ke la Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA ekfunkciu komence de aprilo, ke la Nov-Jorka Oficejo pli aktivu rilate la havigon de siaj financaj rimedoj, ke en Roterdamo necesas urĝe ripari la tegmenton ktp. ktp. Aldonu al ĉio ĉi la personarajn ŝanĝojn en tiuj oficejoj (vidu anoncon sur la lasta kovrilpaĝo) kaj vi komprenos, ke gvidi nuntempe UEA ne signifas nur direkti internacian kulturen organizaĵon sed ankaŭ mastrumi etan multnacian ekonomian entreprenon.

Nu, kiel oni mastrumis en 1980, kiajn financajn rezultojn ĝi portis? La spezokonto, kiu nun iros al la Komitato por aprobo, montras pozitivan saldon de ĉ. 650 guldenoj. Cetere, vi mem povos studi la financajn raportojn pri 1980 en la venonta revunumero, kie aperos la Estrara Raporto. Kvankam la sumo de la pozitiva saldo ja estas simbola, gravas ke la Asocio ne elspezas pli ol ĝi enspezas kaj ke ĝi jam por la sesa sinsekva jaro notas pluson en sia jara finkalkulo. Se oni al ĉio ĉi aldonas la rekordan membronombron en 1980 (vidu la statistikon en nia marta numero, p. 59), la rezultoj de 1980 ja estas kontentigaj. Aliflanke, ĝuste tiu malgrandeco de la pozitiva financa saldo de 1980 nun klare montras, kiom necesa estis la kotizaltiĝo pri kiu la Komitato decidis en Stokholmo. Tamen, en la marta kunsido ŝajnis tre evidente, ke la Estraro devos uzi ĉiujn siajn mastrumajn kvalitojn por eviti negativan saldon en la spezokonto de 1981.



La komputilo (liverita en februaro) estis la ĉefa oficeja novaĵo por la estraranoj; vidu kiel ili gapas al ĝi. Dekstre rideblas Ole Hagemann, komputil-programisto de UEA.

La kunsido tre (fakte: tro) detale traktis la programon de la 66a UK en Brazilio. Ion el tiurilataj decidoj vi legos aliloke en ĉi tiu numero, aliajn la kongresanoj spertos en Brazilo aŭ legos en la Kongresa Libro. Unu prikongresa decido meritas apartan emfazon: Ĉiuj latinamerikanoj povas aliĝi al la 66a UK en Brazilio, ĝis la Kongreso mem, laŭ speciale malalta tarifo de 80,00 guldenoj en la baza aliĝkategorio 3 (Membro-Abonanto de UEA). Kvankam ankoraŭ ne ekzistas valida kandidatigo por organizi la Kongreson en 1983 (eble en Italio?), jam estas definitive, ke la 69a UK okazos en Vankuvero en 1984.

Ke la eksteraj rilatoj de UEA estas tre intensaj kaj fruktodonaj, pri tio vi povas konvinkiĝi ankaŭ el la ĉefartikolo de ĉi tiu numero. Kelkajn kulturajn demandojn, kiuj aliĝis en la kunsida tagordo, traktas aparta artikolo de la vicprezidanto Ragnarsson. Fakte, por atenta sekvento de la estraraj laboroj post Stokholmo, Ragnarsson trudiĝas kiel unu el la ĉefaj gajnoj por la asocia aktiveco. Li jam ŝajnas sukcesi movi kelkajn tradicie dormantajn demandojn sur la kampo de la kultura agado. Dum la marta kunsido Ragnarsson transprenis ankaŭ la fakon de edukado kaj jam faris al

la Estraro almenaŭ du proponojn pri nova strukturo de la ekzistanta Internacia Ekzameno kaj starigo de ekzameno por la mezgrada nivelo. Ni tamen lasos tiujn demandojn nun kaj skribos pli detale kiam definitive ĝos tiuj traktadoj. Cetere, en la Estraro okazis ankaŭ pliaj redisdividoj de la taskoj, kion vi trovos en la koncerna adresaro dorse de la kovrilpaĝo.

Eldona agado, informado, periodaĵoj, landa kaj faka agado, junularo, planado, virina aktiveco, turismo, esploro kaj dokumentado — ankaŭ ĉio ĉi estis en la marta tagordo. Ni ne diros al vi ĉi-foje, kiujn novajn librojn UEA planas eldoni. Ni atendos, ke tiurilate okazu io plia ol principa estrara decido, ĉar pluraj el vi jam komencas mendi ĉe nia Libroservo tiajn titolojn, kiuj aperos nur post du jaroj. Cetere, ne maltrafu gravan estraran decidon pri la libroprezoj, kion ni traktas aliloke en ĉi tiu numero.

Por la fino ni lasis decidon, kiu koncernas ĉi tiun revuon: En 1981 tamen aperos dek unu numeroj de nia revuo, eĉ se tio kaŭzos negativan saldon en la jar-kalkulo. Vi memoras, ke oni jam en la decembra kunsido decidis, ke unu el tiuj numeroj estu speciale dediĉita al la novaj movadanoj.


sm

Atanas D. Atanasov (1892-1981)

EN SOFIO, la 23an de marto forpasis honora membro de UEA Atanas Danĉev Atanasov, konata ankaŭ laŭ la plumnomo "Ada", bulgara aktivulo de la Esperanto-movado jam de sepdek jaroj.

Atanasov naskiĝis la 12an de februaro 1892 en Sofio. Kiel li rakontas en *Rememoroj de esperantisto*, li konatiĝis kun Esperanto kiel dekdujarulo, kiam lia patro, kiu laboris ĉe la Sofia Milit-Lernejo, komisiis lin plenumi la peton de du kadetoj havigi lernolibron pri la lingvo. Ellerninte ĝin en 1908, Atanasov rapide aktiviĝis inter siaj gimnaziaj kamaradoj. En 1910 li kun aliaj studentoj de la Sofia Universitato fondis la Studentan Esperantistan Grupon.

En 1911 Atanasov redakcianiĝis al la mallongviva (1910-1912) sed valora kultura revuo *Danubo*, komuna laboro de bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj. Pli grava parto de lia literatura agado estis pluraj tradukaĵoj el la bulgara: *Bulgaraj rakontoj* (1910, 3a eld. 1923) de Ivan Vazov, la poemo *La fonto de la blank-piedulino* (1921) de P.R. Slavejkov, *La familio Gerak* (1924) kaj *Kvar rakontoj* (1939) de Elin Pelin, kaj la studo *Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helplingvo?* (1928) de I.D. Ŝiŝmanov. Krom lernolibroj por bulga-



roj li originale verkis la menciitan *Rememoroj de esperantisto* (1925), kiu havis ankaŭ japanan eldonon, kaj la milde satiran *El la intima libro de la verdurbaj esperantistoj* (1927). Krome, aperis multaj artikoloj

kaj tradukaĵoj de lia mano en la Esperanta gazetaro. Li estis kunlaboranto de la *Enciklopedio de Esperanto*. Kvankam lia profesia vivo estis dediĉita ĉefe al la industrio (li diplomiĝis pri filologio kaj ekonomiko), Atanasov estis konata ankaŭ kiel lingvisto, kaj post emeritiĝo fariĝis honorofica scienca kunlaboranto de la Instituto de Bulgara Lingvo. Liaj kontribuoj al Esperanto de post la dua mondmilito estis ĉefe filologiaj, kaj li fariĝis prezidanto de Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj je ties fondiĝo en 1963. Li eniris la Akademion de Esperanto en 1964 kaj de 1968 ĝis 1979 servis kiel ĝia vicprezidanto. Ĉe la Universitato de Sofio li estis oficiala lektoro pri Esperanto. Jam de pluraj jaroj en la eldonplano de UEA troviĝas la eseero de Atanasov, *La lingva esenco de Esperanto*. Tiu libro, kies apero estas atendata fine de ĉi tiu aŭ komence de la venonta jaro, denove atentigos nin, ke Atanasov estis unu el la plej atentindaj esperantologoj el la slava lingva teritorio.

Memornotoj pri kulturpolitiko

KIEL ISLANDANO — membro de popolo proksimume samnombra kiel la urbanaro de Antverpeno — mi ofte trovis min antaŭ tiaj demandoj kiel: Ĉu islandanoj havas sian propran lingvon? Propran literaturon? Propran kulturon?

Kiel esperantistoj ni ofte aŭdas similajn demandojn: Ĉu esperantistoj en la diversaj landoj povas kompreni unu la alian? Ĉu literaturo estas kreebla per artefarita lingvo? Ĉu Esperanta kulturo povas esti io alia ol nur pala imitaĵo de la nacilingvaj? Tamen, kutime, estas unu granda diferenco inter tiuj du situacioj. La nesciantoj, informitaj pri la ekzisto de la islanda lingvo kaj ĝia antikva deveno, senescepte interesiĝas pri ĝia literaturo kaj kulturo, ne por momento dubante ilian aŭtentikan realon. Ne tiel facilas por nia povra Esperanto; mencioj pri kulturaj faktoj, kiel ekzemple nia originala literaturo, ofte sukcesas vekti nur moderan miron, sed emas resti daŭre en la abstrakto. (La afero estas tamen tute alia, se oni povas montri nacilingvan tradukon de Esperanta verko, kio laŭ mia sperto ĉiam estigas pozitivan intereson kaj scivolemon. Jes, ĝuste tiajn tradukojn urĝas akceli.)

Sekve: La islandano eliras el la supre priskribita situacio kun kontento, eĉ fiero, la esperantisto kun ia — eble iom neklara — sento de malplivaloro. Kaj eble ĝuste pro tiaj spertoj ni ja pli emas rifuĝi en nian propran esperantistan mondon kaj fermi la pordon malantaŭ ni, por tie en izolo kaj sen relativoj ĝui niajn konvinkojn; aŭ ni drivas for de la Movado kaj forlasas ĝin definitive.

Jam delonge mi pensadis pri tio, kiel kontraŭpezi tian malplivaloriĝemon kaj ĝiajn sekvojn, koncerne Esperanton kaj la evoluon kaj enhavon de ĝia kulturo. Per la sekvantaj malmultaj vortoj mi arogas al mi skize prezenti miajn ideojn, plejparte en rekta rilato kun la kultura agado de UEA.

Dumlonge spertante la konvinkiĝon, ke efika kultura agado de organizaĵo kiel UEA devas baziĝi sur akcepteblaj evolueorio kaj celdifinoj, mi decidis fari provon konturi tian bazon jam komence de mia ofitado kiel nova estrarano pri kulturo. Tial, jam en lasta oktobro, mi dissendis cirkuleron pri la temo al ĉirkaŭ ducent kulture engaĝitaj esperantistoj kaj landaj organizaĵoj iel rilataj al UEA, petante komentojn, kritikojn, sugestojn. Ĝis nun (komence de marto 1981) preskaŭ kvarono de la ricevintoj de la cirkulero reagis letere, ofte amplekse kaj detale, pro kio mi esprimas miajn sincerajn dankojn.

Mia cirkulera artikolo estis triparta. Unue, ĝi enhavis ĝeneralan priskribon de nia aktuala kultura situacio; due, ĝi prezentis mian provon je gvidlinia difino de la

kulturpolitiko de UEA; trie, ĝi antaŭmetis kelkajn konkretcelajn punktojn rilate pli intensan kaj varian kulturagadon de tiu organizaĵo, laŭeble praktitotan en kunlaboro kun la landaj asocioj.

Pri la unua parto mi ĉi tie menciis nur la konkludon, ke vere kontentigaj kulturaj atingoj estas ĉe ni disaj kaj izolitaj, kvankam la latentoj de niaj fortoj ja sufiĉas por pli da efektivo, pli da kohereco. Mankas pli efika interŝanĝado de spertoj, pli celema kunlaboro inter la diversaj kulturagantoj, inter la landaj asocioj, inter ili kaj UEA, inter UEA kaj la diversaj Esperanto-kulturcentroj.

Due, por plifortigi nian memfidon kaj plivervigi la kulturan agadon de UEA sur vasta skalo de entreprenemo kaj kunlaboremo, mi prezentis kvarfaze la opinion, ke ni bezonas a) kulturfilozofian bazon, b) difinitan kulturpolitikon, c) konkretajn celojn, kaj ĉ) plenumajn rimedojn. Mankas spaco por detala pritrakto, sed mallonga resumo eble ne estas sen valoro:

a) **Kulturfilozofia bazo.** Kiel lingva movado ni **nutriĝas** kulture, **transformas** kulturajn valorojn kaj **generas** novajn. Certe la unue menciita faktoro, kultura nutriĝo, ĉiam estis ĉe ni la plej substanca ingredienco. La koncepto konstatas la fakton, ke la uzantoj de Esperanto ĉiam estis nature influataj de siaj propraj nacilingvaj kulturoj, imitis iliajn formajn kaj enhavajn



Pola Esperanto-Teatro en Stokholmo pasintjare: Genero de novaj kulturaj valoroj
(Foto: Z. Nikolov)


valorojn, transprenis iliajn kriteriojn kaj transformis iliajn apartajn karakterojn por vastetenda utiligo en internacia kadro. La Esperanta kulturo kreskis kaj kreskas el tiu multvaria nutriĝado, evoluas kaj direktiĝas al plia aktivo en novaj sintezaj manieroj kaj aperoformoj, kaj la genera proceso komenciĝas. La kultura generado per Esperanto do prenas stimulon el transformoj de nacikulturaj valoroj en la Esperanto-kulturan subtavolon, kio siavice ebligas esence originalan generadon de novaj kulturvaloroj per la lingvo. Ne estas plia loko por detala argumentado de tia kulturkompreno, kiu ankoraŭ atendas plian diskutadon. Mi tamen volas reakcenti la opinion — kiu jam pruviĝis havi la subtenon de la plej multaj komentintoj —, ke difino de nia kulturpolitiko devas baziĝi sur konsidero kaj agnosko de tiuj tri esencaj faktoroj: la nutriĝa, la transforma kaj la genera, kaj ke interefike ili konstruas komplekson de funkcio, kiu dinamike ebligas formiĝon de ĉiam pli aŭtonoma Esperanta kulturo.

b) Nia kulturpolitiko: difino. Surbaze de la supre skizita filozofia bazo eblus difini nian kulturpolitikon. (Mi enmetu, ke ĉi-rilate mi iom etendas la signifon de la vorto "politiko"; mi permesas al mi alciti pri tio komenton de d-ro W. Bormann: "Sub 'politiko' ankaŭ mi komprenas la tuton de la kolektivaj klopodoj pri io, ĉi-kaze la Esperanto-kulturo. Tial 'kulturpolitiko' estas ĉiuj klopodoj estigi spiritajn manifestaciojn en kaj per Esperanto.") Nu, la vortigo de la difino tamen ne estas la ĉefaĵo, sed la realo entenata. Sed certe ĝi ne estas sen valoro, ĉar ĝi konkretigas la esencon en supervideblan formon. Do, jen mia difinoprovo post retaksado baze de diversaj komentoj:

La kulturpolitiko de UEA estas maniero de internacia evoluiga agado pere de Esperanto, kiu surbaze de nutriĝo el nacikulturaj valoroj kaj iliaj transformoj, kaj de ĉiam kreskanta originala generado, disvolvas novajn interkomprenatajn valorojn cele al kreo de konscio pri tuthomara kultura komuneco.

Ĉi-rilate mi volas citi resumajn vortojn de d-rino Marjorie Boulton: "Mi opinias, ke UEA laŭeble celu difinitan kulturpolitikon laŭ la linioj, kiujn vi proponis, sed ke oni penu eviti difinojn tro limigajn; necesas ioma empiriismo. Ofte ni devos modifi niajn ideojn rilate al la praktikaj eblecoj en diversaj cirkonstancoj." Prave. Ne sufiĉas teorioj, ni devas ankaŭ esti pretaj adaptiĝi al la konstatoj de la spertoj pri cirkonstancoj kaj situacioj. La supra, ellaborita provo de difino ankaŭ absolute ne devas esti rigardata kiel ia rigida/rigora kunmetaĵo de vortoj. Tute kontraŭe ĝi celas esti sufiĉe ĝenerala kaj fleksebla por neniel malhelpi aŭ ligi nian agadon.

c) Konkretaj celoj. En la supre menciita cirkulero mi prezentis 12 apartajn punktojn, kiel konkretigajn gvidilojn al pli intensa kaj pli varia kulturagado de UEA. Al tiuj punktoj multaj komentintoj aldonis plurajn aliajn, pli-malpli detalajn. En sekvonta artikolo mi klopodos prezenti organizite tiujn punktojn en formo de ia ideara "banko". Devas nun sufiĉi la informo, ke la aluditaj celoj ne nur rilatas al la interna dis-



Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA: Klopodo pli-intensigi kaj plivariigi la kulturan agadon en la Movado

volviĝo de niaj kulturaj laboroj, sed ankaŭ al vojoj de eliro ekster niajn limojn por diskonigi nian kulturon kaj partopreni neesperantistajn kulturajn aranĝojn.

ĉ) Plenumaj rimedoj. Sen rilatigo al la realo kultura filozofio kaj celoj ne havas multan signifon. Superfluas memorigi pri tio, ke ni jam havas longan tradicion en kreado de ideoj, kiuj restis sen faro. Aŭ, por citi d-ron Sadler: "Ĉiuj jam delonge konsentas pri la bezono, sed neniuj scias indiki, kiu faros tion kaj kiel." Nu, plenumo estas laŭ mi pli-malpli afero de organizo. Unu grava paŝo estas starigo de komisionoj pri kulturo ĉe la landaj asocioj, kie tiaj ne jam ekzistas, kiuj pretos okupi sin i.a. pri planado kaj plenumado de aferoj sur la kultura kampo en kunlaboro kun UEA. Jam estas dissendita al la landaj asocioj instigo por tio, kiu jam komencis doni rezultojn. Aliaj rimedoj estas jam sub diskuto ĉe la Estraro de UEA, precipe koncerne pli varian eldonadon de libroj kaj revuoj.

Tiu ĉi mallonga skizo pri novaj klopodoj pliintensigi kaj plivariigi nian kulturan agadon havas antaŭ ĉio la celon instigi niajn legantojn esprimi sin pri la temo, aŭ al la redaktoro de la revuo, aŭ rekte al mi mem. Mi esperas, ke en iu baldaŭa numero mi povos plue disvolvi la temon, precipe rilate al la lastaj du paragrafoj (c kaj ĉ), kaj mi bonvenigas ĉiujn sugestojn tie utiligeblajn.

Baldur Ragnarsson,
estranaro pri kulturo

Ĉinio bolas, Mongolio varmiĝas

En februaro ĉi-jare, d-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, faris privatan vojaĝon al Ĉinio kaj Mongolio. Jen ĉi tie kelkaj ŝiaj notoj pri la vojaĝo, kiujn ni konsideras aparte interesaj pro la parto pri Mongolio, lando el kiu ni malofte aŭdas movadajn novaĵojn.

Deksep tagoj en Ĉinio

Ekde la mongola ĉefurbo ni estis vojaĝantoj de tiu trajno, kiu iras nur unufoje semajne sur la linio Moskvo — Ulan-Bator — Pekino. La 8an de februaro en la ok vagonoj sidis entute kvin pasaĝeroj: unu japana kaj du britaj diplomaciaj kurieroj, mi kaj mia edzo. La lingva problemo rekte estis senteblo jam ĉe la unua ĉina stacidomo, en la urbo Erlian. Unue oni forprenis niajn pasportojn, kaj post kvarona horo la limgardisto revenis kaj diris, ke ni devas elvagoniĝi. La kaŭzon li ne povis klarigi. Ni timis, ke eble estas iu problemo pri la pasportoj kaj pro tio jam povus finiĝi nia vizito al Ĉinio. La timo estis eĉ pli granda, kiam ni forlasis la trajnon kaj ĝi kun niaj pakaĵoj foriris. La alparolitaj

homoj respondis nur ĉine. Finfine, la oficisto de la monŝanĝejo povis klarigi, ke temas nur pri relŝanĝo, ĉar la relsistemo en Ĉinio estas alia ol tiu en Mongolio. Post tiu ĉi "aventuro" ĉio iris glate. La gvidantoj de Ĉina Esperanto-Ligo akceptis nin tre afable kaj per ilia helpo ni ĝuis riĉan programon. La komencajn kaj la finajn ses tagojn ni pasigis en Pekino, dum la aliaj ni vizitis tri sudajn urbojn: Ŝanhajo, Hangĝou kaj Suĝou. Ĉiujn turismajn programerojn partoprenis ankaŭ 10-15 aliaj esperantistoj. Tiel estis eble senpere kontaktiĝi kun multaj homoj. Inter ili estis troveblaj veteranoj, kiuj lernis la Internacian Lingvon en la tridekaj jaroj aŭ eĉ pli frue. Tamen, la plimulton de la ĉina esperantistaro konsistigas junaj, entuziasmaj homoj, reprezentantaj preskaŭ ĉiujn tavolojn de la ĉina socio. Ili apartenas al tiuj 20 000 homoj, kiuj eklernis Esperanton post la finiĝo de la t.n. kultura revolucio. Espereble, ilia entuziasmo neniam ĉesos kaj ĉiuj restos en la Movado. Estas komuna tasko de ĈEL kaj UEA, ke ili ne trompiĝu kaj havu eblecon utiligi la lingvon. En ĉiuj kvar urboj mi prelegis pri UEA. La ĉeestantoj starigis multajn demandojn. Ili interesiĝis i.a. pri la

REAGOI:

Ni almenaŭ provu!

MALGRAŬ LA BONVOLO de Bruce Arne Sherwood, lia "reago" al la pasiaj helpopetoj de ges-roj Saheb-Zamani (*Esperanto*, jan. 1981, p. 6) povas nur konfirmi la timon de la iranaj pioniroj, ke la "Okcidento" aplaudos ilin sed ne serioze provos respondi al iliaj pledoj, ke ni repensu niajn prioritatojn. Estas ironie, ke s-ro Sherwood verŝas fridan akvon sur la iranajn petojn pri scienc-teknika literaturo pro tio, ke ni multnombros — kaj sampaĝe konsilas pli da "politikaj premoj", kiuj ja postulus, ke ni "multnombru".

Eble la pesimismo de s-ro Sherwood estas prava. Eble mi en Aŭstralio, for de la ĉeflando de la Movado, rigardas la aferon tro optimisme. Sed mi ne deziras, ke la irananoj tute rezignu esperi pri helpo de ekstere. Ĉu aliaj movadanoj pensas simile?

Ĉu ekzistas majstroverkoj en scienco, ne tuŝas la kernon de la problemo. La irananoj mem — niaj samlingvanoj en konsulto kun ekstermovadaj fakuloj — decidu, kio estas tradukinda el la diversaj lingvoj kaj sendu listojn al UEA. UEA publikigu tiujn listojn kaj petu la kunlaboron de kompetentaj tradukontoj; unu

fakulo respondecu pri la fina redaktado de tradukoj sur sia kampo.

Ne temas unuavice pri originala verkado. La demando estas, ĉu troviĝas en niaj vicoj sufiĉe da kapablaj tradukantoj. Ĉiu el ni respondu por si mem. Mi ekzemple studis ĉefe la historion de Eŭropo; konfesinde tiu kampo nemulte taŭgus en tiu ĉi debato. Sed — ĉu tro malhumile? — mi kredas ke, se oni petus min, mi sukcesus verki uzeblajn tradukojn el iuj aliaj fakoj. Mi uzus ĉiajn jam ekzistantajn terminarojn, kaj mi senhonte petus helpon de universitataj kolegoj en mia urbo. (Kaj parenteze, kunlaborado en tia grandioza sed samtempe konkreta projekto pli persvadus miajn kolegojn pri la seriozeco de Esperanto ol nia tuta ĝisnuna librostoko.) Ĉu ne estas miloj da esperantistoj, kiuj volonte agas simile?

Vere grandskala tradukprojekto postulos financon preter la rimedoj de UEA. Eble ni devos fari modestan komencon; sed, se ni eĉ etkadre sukcesos "sensoifigi" homojn en triamonda lando, kie la soifo jam nemiskompreneble manifestiĝas, ĉu ni ne rajtos esperi je helpo de potencaj ekstermovadaj organizaĵoj kaj individuoj? Kaj, se ni atingos konsiderindajn rezultojn en Irano, ĉu ne eblas esperi, ke aliaj landoj kun similaj problemoj ekpensos pri Esperanto?

Ni almenaŭ provu plenumi la esperojn de niaj amikoj en Irano!

Trevor Steele



La valoro de personaj kontaktoj: Flóra Szabó-Felső (meze de la bildo) kun Hang Chung de la Esperanta redakcio de Radio Pekino. Dekstre staras d-ro P. Felső.

libroeldonado, scienca agado, esperantlingva gazetaro, rilatoj kun UN kaj Unesko, ĝenerala stato de la Movado en diversaj landoj. La salonoj ĉiam estis plenaj: en Suĝou 25, en Hangĝou 50, en Ŝanhajo kaj Pekino po pli ol 100 personoj partoprenis.

Estis interesa la vizito al unu el la pekinaj kursoj. Inter la 50 gekursanoj estis intelektuloj, studentoj, artistoj kaj laboristoj. La kurso komenciĝis en oktobro, sed pluraj partoprenantoj jam sufiĉe bone parolis. Ni aŭdis ankaŭ pri alia pekina kurso. Ĝi okazas en grandega salono kaj tie samtempe 700 personoj estas instruataj. Verŝajne Ĉinio estas la lando, kie laboras plej multe da profesiaj esperantistoj. Ni havis eblecon renkonti la kunlaborantojn de Esperanto-Fako de Fremdlingva Eldonejo kaj de *El popola Ĉinio*. Okazis vizito al Radio Pekino kaj renkontiĝo kun la membroj de ĝia Esperanto-redakcio. Ili petis, ke la movadaj informoj atingu ilin pli rapide ol ĝis nun, ĉar se ili ĉerpas nur el gazetoj, tio kaŭzas malaktualiĝon.

Estis tre utilaj la interparoloj kun la gvidantoj de Ĉina Esperanto-Ligo kaj de lokaj Esperanto-organizaĵoj. Ĝoje mi konstatis, ke ili sincere deziras kunlabori kun alilandaj esperantistoj kaj kun UEA. La vizito en Ĉinio estis tre utila ankaŭ por mi mem. Denove praviĝis, ke pli multon valoras unu vizito ol cent cirkuleroj.

Movada revigliĝo en Mongolio

La vizito al Ĉinio ebligis, ke survoje mi renkontu en Ulan-Bator la gvidantojn de Mongola Esperanto-Unuiĝo. En la flughaveno atendis nin la prezidanto de MEU, prof. Lubsangĝab, kaj la sekretario, s-ro Dogsüren. Dum du tagoj ni havis tre interesajn interparolojn. Laŭ la informoj, la Unuiĝo havas ĉ. 60 membrojn, el kiuj 40 loĝas en la ĉefurbo. Ili sentas izolatecon, ĉar antaŭ ni, dum la lastaj 10 jaroj, nur 3 eksterlandaj esperantistoj vizitis Mongolion. Nun ili

ŝatus pli aktive ekagi kaj intensigi la rilatojn kun eksterlandaj esperantistoj.

Revenante el Ĉinio ni denove pasis tra Ulan-Bator kaj vizitis s-ron Cedev, la prezidanton de la Komitato de Verkistoj. Tiu ĉi Komitato helpas la Esperanto-movadon en Mongolio. Ĵus antaŭ nia foriro el Ulan-Bator, s-ro Dogsüren jam montris al mi la kvinjaran eldonplanon, por kio la Komitato de Verksitoj donas financon helpon. En la plano aperas novaj lernolibro kaj granda vortaro de Esperanto. Por la eldonaĵoj, precipe por la vortaro, ili bezonas ankaŭ eksterlandan helpon.

Flóra Szabó-Felső

ESPERANTO-MOVADO KAJ HANDIKAPULOJ:

Agi unuavice home

”PRI ALIAJ handikapuloj [krom blinduloj] oni pli-malpli nenion aŭdas en la Movado, kvankam malfacilas kredi, ke ili ne ekzistas.” Jen frazo el artikolo de sm en ĉi tiu revuo (marto, p. 43). Ĉu mirige?

Nu, sm ne bezonas ”kredi” ke ili ekzistas. Se oni rondrigardas en ekzemple UK, oni rimarkas kongresanojn handikapitajn: vide, aŭde, move, intelekto, emocie aŭ parole (mi ne celas la eternajn komencantojn). Sed tamen nur ĝis certa grado. Kial? Unue ni konsciu, ke homo komplete surda ankaŭ paroladojn en Esperanto ne aŭdas, do supozeble ne multe profitas de UK-programo. Kaj, aliflanke, ke internacia vojaĝado en rulseĝo estas ofte superhoma tasko, ĉu oni parolas Esperanton aŭ ne. Cetere, post alveno en kongresejo restas problemoj, se oni (rulseĝe?) grimpu ŝtuparon por atingi lifton al la salonoj. . .

Kiugrade do la "demando de handikapuloj" koncernas "la Movadon"? Laŭ mi:

A. Ekzistas problemoj, solvendaj, en Esperanto-organizaĵoj kaj -aranĝoj, kiuj estas identaj al la problemoj en ne-esperantistaj rondoj. Tiujn ni provu solvi ankaŭ interne de la Movado, sendepende de nia esperantisteco, simple ĉar ni estas homoj.

Do, ekzemple: – Kongresejoj kaj kunvenejoj estu alireblaj per rulseĝo. – Niaj revuoj aperu sonbende, se ne brajle. – Ni ne alparolu la akompananton de handikapulo, sed la homon mem. (Legu "Ne tiel, sed ĉi tiel" kaj "Ĉu ne eblas ĉi tiel?") Ktp. ktp.

B. Ekzistas problemoj, solvendaj, kie la kapablo paroli la Internacian Lingvon neniel helpas aŭ influas la eblajn solvojn. Tiujn ni provu solvi, sed ekster la E-movado. Nur foje la lingvo povas servi, kiel ilo, en internacia organizado de help-agadoj.

Do, ekzemple: – Ni laboru, ekster la Movado, por pli bona uzebleco de publikaj transportiloj. – Kaj por integriĝo de la handikapuloj en la socio. – Ni utiligu la ekzistantajn subvenci-eblecojn por ekzemple brajligo aŭ surbendigo de libroj ankaŭ por niaj homoj; se tiaj eblecoj ne ekzistas, ni batalu por ili, sed ne nur por la avantaĝo de E-parolantoj. – Ni apogu help-agadojn (kiel E3, kiu celas helpi al prevento de blindiĝo), entuziasmigante ĉefe ankaŭ la ne-esperantistojn ĉirkaŭ ni, ĉar por tia agado la lingvo estas "nura" organiza ilo. Ktp. ktp.

C. Tamen, ekzistas ankaŭ problemoj, solveblaj pli bone kun la Internacia Lingvo ol sen ĝi. Kaj, laŭ mi, ĝuste tie kuŝas tasko por la Movado. Lande kaj internacie.

Ekzemple: – Almenaŭ unu instruisto de intelekto handikapitaj infanoj utiligas Esperanton por doni al siaj lernantoj iom da internaciaj kontaktoj, kvankam ili mem supozeble ne kapablas lerni la lingvon. – Homoj kiuj pro sia handikapo ne povas vojaĝi, povas akiri internaciajn kontaktojn per Esperanto. – Eble iuj, kiuj ne kapablas lerni "malfacilajn fremdlingvojn", povas lerni la malpli komplikajn Internacian Lingvon. Ktp. ktp.

Ĝenerale: Homoj kiuj havas handikapon, aldone al la "lingva handikapo" kiun havas la plej granda plimulto de la teranoj, povas pligrandigi siajn kapablojn, venkante la lingvan handikapon, eĉ se restas la alia.

Nu. Kio do estas niaj taskoj (sendepende de la Jaro de Handikapuloj)?

A. Ni forigu barojn por handikapuloj ankaŭ interne de la Movado.

B. Ni laboru, ekster la Movado, por prevento de estiĝo de handikapoj kaj por malpligrandigo de ties efikoj. Se necese kaj se eble, utiligante la Internacian Lingvon por internaciaj kontaktoj.

C. Ni demandu nin, kiuj "kategorioj" de handikapuloj profitus eĉ pli ol la ceteraj homoj de la kono de Esperanto – kaj ni atentigu ilin pri tiu utilo.

Ĉ. Ni daŭre okupiĝu pri tiuj miliardoj da lingve handikapitaj samteranoj, kiuj eĉ ne konscias pri sia handikapo en internaciaj rilatoj.

Wouter F. Pilger

LIBROMERKATO:


Libroj kostos pli en junio ĉi-jare

PRI LIBROJ ni havas ĉi-foje unu bonan kaj unu malbonan novaĵojn. La bona novaĵo koncernas la eldonintojn de la 28 libroj kaj gramofondiskoj, kiuj eniras nian tradician liston de la plej multe vendataj libroj dum la pasinta jaro – 1980. Por iom prikomenti tiun liston ni diru, ke ĝi aspektas tradicie, ke ĝi ne alportas multajn surprizojn.

La honoran lokon en la listo okupas la studo de d-ro John C. Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, kiu ankaŭ en 1979, kiam ĝi aperis, estis en la supro de la listo. Ĝenerale, ĉ. du trionoj de la listigitaj titoloj estas prilingvaj verkoj, kio klare indikas la preferon de la aĉetantoj.

Ni nomus surprizo la lokon, kiun elbatalis la islanda gramofondisko *Songpoemo pri ponto*. Kvankam ĝi aperis jam en 1978, la aĉetantoj ŝajne nur nun komencas konsciiĝi, ke temas pri unu el la plej interesaj kantokolektoj iam eldonitaj en Esperanto. Ne estas surprizo, ke libroj de Waringhien kaj Auld denove troviĝas en la listo, sed estas agrable konstati, ke *Kiel diri . . . ?* de Lentaigne kaj *Lingvaj ludoj de GEJ*, du interesaj kaj novstilaj verkoj prilingvaj, jam sukcesis okupi atentindajn lokojn en la listo.

Cetere, jen la listo mem (kun guldenaj prezoj), por viaj propraj pristudo kaj konkludoj:



Persona kontakto kun libro ĉiam stimulas aĉetonton.

1. <i>Lingvistikaj aspektoj de Esperanto</i> (Wells)	12,00
2. <i>Plena ilustrita vortaro</i> (Waringhien k.a.)	114,30
3. <i>Praktika bildvortaro de Esperanto</i> (T. Watts)	15,60
4. <i>Songpoemo pri ponto</i> (islanda gramofondisko)	27,90
5. <i>Asteriks la gaŭlo</i>	13,20
6. <i>Ĉiu ĉiun</i> (Teo Jung)	36,00
7. <i>ABZ de amo</i> (I. kaj S. Hegeler)	33,00
<i>Esperanto en perspektivo</i> (Lapenna, Lins, Carlevaro)	84,00
8. <i>Kiel diri...?</i> (Lentaigne)	9,00
<i>Plena vortaro kun suplemento</i>	26,40
9. <i>Veselin Damjanov kantas en Esperanto</i> (grandformata disko)	18,00
10. <i>Gvidlibro por supera ekzameno</i> (Pechan)	15,00
11. <i>Baza literatura krestomatio</i> (Benczik)	13,80
<i>Inkunabloj de Esperanto</i> (ludovikito)	39,00
12. <i>1887 kaj la sekvo...</i> (Waringhien)	33,00
<i>Pri lingvo kaj aliaj artoj</i> (Auld)	18,00
13. <i>Infanoj en la mondo</i> (bildlibro de UNICEF)	11,10
<i>Kumeŭaŭa</i> (T. Sekelj)	9,60
14. <i>Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto</i> (Auld)	15,00
<i>Esperanto and English Dictionary</i> (Wells)	11,70

Ekde la 1-a de junio 1981, la Libroservo de UEA altiĝos la procentaĵon de la sendokostoj al 20%, kaj la minimuman sumon de sendokostoj al 5,00 guldenoj. Escepto ĉi-rilate estos la mendoj, kies suma valoro de la varoj superos 200,00 guldenojn; la sendokosto por tiaj mendoj restos ĉe la ĝisnunaj 10%.

En multaj landoj, kiuj — same kiel Nederlando — lastatempe draste altiĝis la afrankokostojn, ĉi tiu decido de la Estraro de UEA montriĝos esti io atendebla. Tamen, la altiĝo de la sendokostoj trafas, kun nia bedaŭro, multajn regulajn kaj fidelajn klientojn de la Libroservo de UEA.

Kio estas — pli precize — la kaŭzoj de ĉi tiu altiĝo? Jam en la komenco de januaro 1981, la nederlandaj poŝtaj tarifoj altiĝis tiel, ke por ekspedi unu kilogramon da libroj al eksterlando oni nun pagas 8,50 guldenojn; por 5-kilograma pakaĵo (maksimuma pezo de librosendaĵo) la afranko nun kostas 20,00 guldenojn.

Ĉio ĉi signifas, ke la suma prezo de la libroj ekde la 1-a de junio ĉi-jare fariĝos pli alta. Tio ja estas iom evitebla, se oni grupigas siajn mendojn kaj sukcesas superi la mendosumon de 200,00 guldenoj, kion jam ofte faras multaj revendistoj, kiuj restas la ĉefaj klientoj de la Libroservo de UEA. Bonvolu do bone noti, ke viaj mendoj, kiuj atingos nin post la fino de majo



Librovendejo dum la 65a UK en Stokholmo servis ankaŭ kiel utila ekspozicio de la eldona aktiveco en la Internacia Lingvo. (Ambaŭ fotoj de Z. Nikolov)

15. <i>Lingvaj ludoj de GEJ</i>	6,00
16. <i>Concise Dictionary of 26 Languages</i>	9,60
<i>Internacia komerca-ekonomika vortaro</i> (Munniksma k.a.)	90,00
17. <i>Kun gradaj paŝoj eksterlanden!</i> (ludovikito)	39,00
<i>Sarkasme kaj entuziasme</i> (Miyamoto)	18,00
18. <i>Ĉu li bremsis sufiĉe?</i> (Valano)	12,00
19. <i>Esperantologiaj studoj</i> (Wüster)	24,00
20. <i>Pri Esperanta tradukarto</i> (de Diego)	11,70

Nun, kun bedaŭro, tiu malbona novaĵo pri la libroj, kiun ni promesis komence de ĉi tiu teksto:

1981, estos traktitaj konforme al la nova decido pri la alteco de la sendokostoj.

Ankoraŭ, fine, informo por la mendintoj de *Plena analiza gramatiko*: La unuaj 500 ekzempleroj de la libro, kiuj atingis nin aere el Ĉinio, vendiĝis en malpli ol du monatoj. Ni atendas marpoŝtan liveron de la resto de 2500 ekzempleroj meze de aprilo. Tuj post la alveno de tiu stoko la Libroservo plenumos la amasiĝintajn mendojn por kelkcento da ekzempleroj. El tio vi konkludas, ke la libro tre bone vendiĝas kaj ke ĝi jam akaparas altan lokon en nia venontjare publikigota listo de la pleje vendataj libroj dum 1981.



Kongresa Komuniko

**66a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Brazilio (Brazilo)
1981 07 25 – 08 01**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

**Adreso de LKK: Caixa Postal 04-0406,
BR-70000 Brasília (DF), Brazilo**

Flugu kun UEA. Jam kongresanoj komencis rezervi lokojn en la diversaj flugprogramoj, kiujn organizas UEA kunlabore kun la konataj kompanioj Varig, Lufthansa kaj KLM. Interesitoj vidu la anoncon sur la dorskovrilo de ĉi tiu numero.

Nefermita inaŭguro. La Solena Inaŭguro de la 66a Universala Kongreso verŝajne okazos ekster la kongresdomo, en ejo sufiĉe granda por akcepti ne nur la kongresanojn, sed ankaŭ multajn interesitojn el la ĝenerala publiko en Brazilio. Estas antaŭvidite, ke la inaŭguran paroladon pri la kongresa temo faros la prezidanto de la Akademio de Esperanto, William Auld.

Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj. Tiun temon la kongreso traktos el tri vidpunktoj: sociologia, nacikultura kaj ĝenerala. Prelegos i.a. Baldur Ragnarsson, Humphrey Tonkin kaj Sylla Chaves, kaj la kongresanoj havos okazon partopreni tri apartajn seminariojn pri la temo.


Internacia Kongresa Universitato. La 34a sesio de tiu pasintjare rebaptita kleriga prelegserio prezentos 13 prelegantojn el 11 landoj: Heikki Alikoski (Finnlando): "Pri la serĉado de planedetoj per grandkampaj teleskopoj"; Alberto Barrocas Behar (Urugvajo): "La akvo kaj la naturo"; Vilmos Benczik (Hungario): "Eŭropa kulturo en azia lingvo"; Werner Bormann (FR Germanio): "Lingvoj kaj kulturoj ĉirkaŭ eksterlandaj laboristoj"; Ĉen Juan (Ĉinio): "Interinfluo de lingvoj"; Helmar Frank (FR Germanio): "Kibernetika psikologio"; Ottó Haszpra (Hungario): "Traeŭropa akvovojo"; Tosihide Kuwahara (Japanio): "Artistaj farboj"; François Lo Jacomo (Francio): "Kiel aspektas kvarimensia spaco"; Jannes Markus Mabesoone (Brazilo): "Geologio de Brazilo"; Tibor Sekelj (Jugoslavio): "Evolulandoj serĉas sian kulturan identecon"; So Gilsu (Korea Resp.): "Pensoj pri interezo"; kaj Alojzy Wenclewski (Zairio): "Fontoj de animalproteinoj en Zairo". Rektoro de la ĉi-jara sesio estas Paulo Vieira da Silva, konata specialisto pri edukado en la Universitato de Brazilio.

Riĉa kleriga programo. Se vi alvenos ĝustatempe, vi povos dediĉi la sabatan posttagmezon al ekspresa kurso de la portugala lingvo. Enkondukos vin en la kongreslandan lingvon s-ro José Passini.

Okazos la kutimaj kursoj de Esperanto. Adriano Breddels de Internacia Esperanto-Instituto seminare demonstras la faman instrumentodon de Andreo Cseh (aparta kotizo pagenda); William Auld estros la progresigan kurson; okazos ankaŭ konversaciaj rondoj por malpli spertaj parolantoj.

Ankoraŭ pri la poŝtmarko. Filatelistoj nepre alvenu al la kongresurbo ĝis sabato, la 25a de julio, ĉar tiuvespere LKK planas mallongan ceremonian "lanĉon" de la kongresa poŝtmarko, kiu kredeble eldoniĝos en ĉ. 1,5 milionoj da ekzempleroj, kun afranko taŭga por internacia sendo. Ĉi tio estos la tria poŝtmarko en kvar sinsekvaj kongresjaroj.

La Akademio publike. Por la unua fojo en multaj jaroj, la Akademio de Esperanto havos dum la Universala Kongreso ne nur fermitan kunsidon sed ankaŭ publikan.



San-Paŭlo: La plej granda sudhemisfera urbego havas ankaŭ la plej fortan E-movadon en tiu mondduono.

Ekspozicioj aranĝataj. La kongresanoj havos vidindaĵojn per kiuj sin okupi en la kongresejo inter la multaj interesaj eroj de la programo. Inter kelkaj proponoj pri ekspozicio, jam akceptita estas tiu de la Fondaĵo de Indiĝenoj de Brazilo, kiu konigos la vivmanierojn de la sudamerikaj indianoj.

Denove aŭkcio. Post la sukceso de la pasintjara aranĝo en Stokholmo, kiu venigis ĉ. 1 600 guldenojn en la kason de Fondaĵo Azio-Afriko, aŭkcio estas denove planata por Brazilio. Proponoj pri objektoj, kiujn oni volus tiucele donaci, estus bonvenaj ĉe la konstanta adreso. La ĉi-jara gajno iros al Fondaĵo Canuto, kiu helpas membrigi en UEA homojn el landoj kun transpagaj problemoj.

Por ke venu tiuj, kiuj ne povas

ANTAŬ KVIN JAROJ, pro striko, ĝenerala, mi devis resti en Islando dek neplanitajn tagojn. Nigramerkata aviadilo — se oni tiel nomas aĵon kapablan flugigi kvin personojn — prenis ankaŭ min al Akureyri, preskaŭ ĉe la Polusa Cirklo en la nordo de Islando. Iu diris al mi tiam, ke en vilaĝo, konsistanta el du-tri domoj, pli norde, vivas esperantisto, kiu ankoraŭ neniam parole uzis la lingvon. Mi insistis, kaj ni iris tien. Efektive, Jón, kiel nomiĝis li (kaj ĉiu tria islandano, cetere), jam de jardekoj konis Esperanton kaj korespondis kun argentinano, bulgaro, nov-zelandano . . . Sed, li devis rimarkeble ŝviti en la unua duonhoro de nia vizito, ĉar necesis nun subite paroli la lingvon. Li sukcesis. Iom pli ol jaron post tio, mi renkontis Jón ĉe la Kongreso en Rejkjaviko. Li deliris preskaŭ: Tiom da eblecoj por paroli Esperanton! Kun tiom da diversnacianoj!

Mi ofte pensis pri Jón kaj lia familio dum la lastaj jaroj. Ne pro tio, ke li poste sendis al mi donacon pro kiu eĉ la nederlandaj doganistoj ne sukcesis kaŝi miron: kvin kilogramoj da islandaj virŝafaj kornoj. Mi pensis, ke Jón devis atendi plurajn jardekojn antaŭ ol li havis ŝancon parole uzi la Internacian Lingvon.

Kiam mi estis pasintjare en Sud-Ameriko, mi renkontis tie homojn, kiuj sian tutan vivon atendas okazon, similan al tiu, kiun Jón havis en Rejkjaviko. Vi mem konscias, ke necesis (ĉu necesis?), ke pasu pli ol 75 jaroj kaj 65 Universalaj Kongresoj, antaŭ ol unu el ili — la 66a UK — venu al Sud-Ameriko. Malfeliĉe, temas pri vasta kaj materie ankoraŭ evoluanta kontinento. Multaj peruanoj, ekvadoranoj, kolombianoj, argentinanoj, ĉilianoj kaj eĉ brazilanoj mem, ne sukcesos kovri la kostojn de la aliĝo. UEA fiksas speciale malaltan tarifon. Sed tio ne sufiĉas. Necesas, ke ni, kiuj ne plu kapablas nombri la partoprenitajn Kongresojn, memoru la ekziston de la Adopta Kaso. Ne gravas, ĉu ni mem iros al Brazilo. Ni kontribuu, por ke venu tiuj, kiuj ne povas. Antaŭdankon ilianome!

sm

Recenzoj

Omnibusa kolekto

Recenzas Klaus Schubert (FR Germanio):

L'omnibuso kun la tri pasaĝeroj, de Masao Miyamoto (1913-), Masao Ueyama (1910-) kaj Ezo Saito. Kioto: L'omnibuso, 1980. 65p. 18cm.

Jen libreto originala kaj tradukita, proza kaj poezia, de du aŭtoroj, aŭ eble de tri. Entute, mirinda libro. Mirinda kolekto el tradukoj de japanaj poemoj, hajkoj kaj utaoj, el la nuna jarmilo, el originalaj poemoj kaj prozaĵoj pri tiel malsamaj temoj aŭ cerbuminstigiloj kiel la konkero de Okinavo fare de la usona armeo en 1945 aŭ la aspekto de la vitroj en la fenestroj de kristana kapelo: de ekstere nigraj, de interne fluo de koloroj. La poemoj spiras ne tiel okazaĵojn aŭ faktojn, kiel sentojn kaj impresojn, lerte vestitajn en vortoj. Kaj ankaŭ la prozaĵoj estas siaspeca poezio. Ili uzas, samkiel la poemoj, la tre vastan vortprovizon de poeto kaj vi prefere metu vian PIVon apude, kiam vi legas ĉi tiun libron. Sume, sur sesdeko da paĝoj prezentigas 23 revigaj kaj pensigaj kontribuadoj.

Ĉi tiu multfaceta japanajo estas dividita en la partojn de Masao Miyamoto kaj de Masao Ueyama. Kiel trian aŭtoron la titolpaĝo kaj la postparolo mencias nomon eble malpli konatan: Ezo Saito. Sed la leganto ne ekscias, kion fakte verkis li. Unu lia kontribuo tamen estas certa: Ezo Saito estas la posedanto kaj ŝoforo de *L'omnibuso*, tiu kultura revuo kaj eldonejo, kiun *Esperanto en perspektivo* nomas "modesta sed agema". Ambaŭ Masaoj dediĉas la libron al la deksejariĝo de tiu omnibuso.

Mendu ĉe UEA: 12,30 (por Nederlando 12,79) gld., plus sendokostoj 10%.

Por konatiĝi kun probablokalkulo

Recenzas Jan Otto de Kat (Nederlando):

Probablokalkulo, de O. Reiersøl. Liège: SUK, 1976. 80p. 30cm.

Ni vivas en mondo, kie regas *leĝo de kaŭzo kaj sekvo*. Kelkaj eĉ asertas, ke tiu estu la sola leĝo reganta la universon. Kiel ajn, kiam sinsekvo de fenomenoj obeas tiun leĝon, ni povas fari sciencan priskribon. Tio signifas, ke oni povas fari *matematikan modelon*, en kiu simila matematika leĝo validas. Se ni sukcesas farante tion, ni povas *antaŭdiri* certajn fenomenojn kaj kalkuli, helpe de formuloj, sinsekvajn statojn. Pri tio oni povas doni multajn ekzemplojn. Rigardu, ekzemple, faladon de ŝtono. Ni scias (dank' al Neŭtono) la koncernan matematikan leĝon. Temas pri formulo, kiu

liveras la sekvon de la kaŭzo: malteno de objekto sur certa nivelo. Post sufiĉe simpla kalkulado ni povas *antaŭdiri* la sekvon: kun kiu rapideco la objekto trafas la teron. Ĉi-kaze nur malmultaj kvantoj ludas rolon, kiel la gravita akcelo, la komencaj rapideco kaj alteco. La trafo de la tero do estas la sekvo de *tri kaŭzoj*. Tiuj kaŭzo/sekvo-rilatoj estas superrigardeblaj. Sed ni scias, ke aliaj fenomenoj havas multe pli da kaŭzoj. En la kazo de la falanta ŝtono fakte ankaŭ la rezisto de la aero ludas rolon. Tiu estas kalkulebla, se ni scias la dimensiojn de la ŝtono.

Sed, kiam la nombro de kaŭzoj de iu fenomeno kreskas, la kalkulado, kompreneble, fariĝas pli malfacila. Kleruloj elpensis kaj ĉiam denove elpensas novajn metodojn, per kiuj oni povas kalkuli ian rezulton, kiu havas pli da kaŭzoj. Pri dek aŭ dudek kaŭzoj ni ofte ne plu timas. Sed kion fari, se oni povas indiki centojn da kaŭzoj aŭ eĉ milojn? Tiaj kazoj, kiuj tamen tre ofte okazas, ne estas kalkuleblaj per rektaj matematikaj metodoj. Rigardu, ekzemple, kiom da kaŭzoj fiksas la korpopezon de iu. Ni tuj povas mencii dekojn, ekz. la aĝo, sekso, manĝkutimoj, praparencoj, laboro, malsanoj ktp., kaj ni povas daŭrigi ĝis okazaĵoj malproksime en la pasinteco. Por tiaj ŝajne ordinaraĵoj aferoj ne ekzistas rektaj kalkulmetodoj.

Por tamen antaŭdiri ion pri tiaspecaj problemoj oni ellaboris la probablokalkulon. La procedo fakte estas simpla: prenu el pristudenda okazaĵo multajn samplajn kaj kalkulu la *meznombro rezulton*. Tiu havas la plej grandan *ŝancon* por aperi. El tio ni povas difini la koncepton "ŝanco" matematike, kaj per tiu la probablokalkulo naskiĝis. Tiamaniere ni tamen povas antaŭdiri ion pri okazaĵoj, kiuj ne estas rekte kalkuleblaj, sed pri kiuj ni povas fari multajn observadojn.

Reiersøl komencas sian verkon ĝuste per tiaj ekzemploj, kiel la distribuo de la nombro de knaboj kaj knabinoj, naskiĝintaj dum certa periodo sur certa loko. Post tio sekvas la difino de matematikaj konceptoj el la logistiko kaj la kombinatoriko, kiuj estas nemank-eblaj por la konstruo de la probablokalkulo. Kvankam temas — ankaŭ laŭ la verkisto — pri elementa enkonduko, la leganto tamen devas scii ion pri la analitiko (diferenciala kaj integrala kalkulo) por kompreni la argumentadon. Por tiuj la verko vere estas interesa resumo, ankaŭ pro la Esperanto-traduko de multaj fakesprimoj, el kiuj kelkaj ankoraŭ ne estas troveblaj en la *Plena vortaro*, ekz.: a estas pozitiva se $a > 0$, kaj *pozitiva* se $a \geq 0$; a *plias* b se $a > b$, kaj *plialas* b se $a \geq b$. Mi ne scias ĉu Reiersøl mem elpensis tiujn vortojn, sed ili certe estas utilaj (li donas vortliston sur p.74). Pro tiu ĉi kialo la verkon certe devus pristudi komisionoj, kiuj sin okupas pri novaj sciencaj esprimoj. Sed tio fakte validas por ĉiuj eldonoj de SUK. Ni devas danki sciencistojn kiel Reiersøl (kaj SUK!), ke ili pretas uzi tempon kaj penon por eldoni tiajn eseojn. Per tio oni aldonas gravan kontribuon al la scienca apliko de Esperanto.

Mendu ĉe UEA: 15,90 (por Nederlando 16,53) gld., plus sendokostoj 10%.

Utila kaj novstila

Recenzas Hilary Chapman (Britio):

Lingvaj ludoj de GEJ. Kompilis Elisabeth Kuhl. Paderborn: Germana Esperanto-Junularo, 1980 (neindikita). 52p. (nenumeritaj). 21cm.

Lingvon oni povas akiri nur pere de uzado kaj praktikado. Tiel oni foje ne povas eviti tedan ripetadon en la klasĉambro. Bona lingvo-instruisto ĉiam serĉas manieron spici la lecionojn, ĉar oni ja povas amuziĝi kaj lerni samtempe. La uzo de lingvaj ludoj (efektive temas pri neformalaj instrumentoj) helpas forigi ne nur la enuon sed ankaŭ la barojn, kiuj foje leviĝas inter lernantoj kaj instruisto.

Ideale, lernanto de iu lingvo volas paroli ĝin, scipovi kompreni aŭdatan lingvaĵon kaj, plie regi la skriban lingvon. La libreto eldonita de GEJ provizas metodojn amuze kaj interese praktiki ĉiujn lingvokapablojn.

Tiu ĉi broŝuro estas nekompleta kolekto de ludoj, kiuj iel helpas en la lernado aŭ instruado de Esperanto. La kompilinto promesas pliajn kompletigajn paĝojn. Tiujn oni facile povos aldoni. Aparte interesaj kaj utilaj mi trovis la ludojn "Amleteroj", "Freneza mondo" kaj "Malpermesitaj vortoj".

La uzo de signoj por klasifi la ludojn laŭ la bezonata lingva nivelo estas helpa al la gvidanto aŭ instruisto, sed mi bedaŭras, ke la paĝoj ne estas numeritaj. Krome, mi bonvenigus indeksojn pri, ekzemple, paroligaj ludoj.

Mendu ĉe UEA: 6,00 (por Nederlando 6,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Artikolaro de Ossaka

Recenzas W.A. Verloren v. Themaat (Nederl.):

Prilingvaj artikoloj de Ossaka; Liaj cirkuleroj interne de la Lingva Komisiono de Japania Esperanto-Instituto, de K. Ossaka (1888-1969). Kompilis N. Kawasaki. Oosaka: Kasiwara Esperanto Dokumento-Centro, 1978. 59p. 36x26cm.

Ĝi ne estas verkita kiel unu libro, sed artikolaro kolektita de persono alia ol la aŭtoro. Ĝi konfirmas el propra sperto la facilecon de la skema vortfarado por homoj kun neeŭropa gepatra lingvo. Ĝi estas ĉefe kompilaĵo de la ortodoksa memanalizo de Esperanto, ĝenerale sufiĉe konservativa en sia teoria fono. Kiel ĉefan originalaĵon ĝi entenas intelligentan analizon de la diafanaj afiksoj (kiuj ne ŝanĝas la gramatikan karakteron de la vorto, p. 33). Ĝi entenas kelkajn faktajn malĝustaĵojn: Interlinguan verkis ne s-ino Morris, sed d-ro Gode kiel ĉefaŭtoro (p. 5). La "Memorando esperantista" (p. 5-7) havas gravajn lakunojn: mankas i.a. la aperjaro de *Literatura mondo*. La opinio, ke la homa pralingvo estis izola (p. 17), estas spekulacia: komparu la opinion de Jespersen en la lasta ĉapitro de *Language* (Lingvo). La lingvaĵo ne estas senriproĉa: mi

trovis i.a. 28 mankantajn artikolojn. Konkludo: eble interesa por ekkoni la aspekton de Esperanto en la okuloj de japanoj, sed ne nepre leginda por interesato pri esperantologio.

Mendu ĉe UEA: 16,50 (por Nederlando 17,16) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Al Diogneto. El la helena tr. Isai Sumber (ps.). Vlaardingen: VoKo, 1981. 24p. 21cm. Voĉoj Kristanaj 4. Teologia epistolo el tre frua periodo de la kristanismo. Prezo: 1,80 gld.

Amuzaj dialogoj en Esperanto (1973), Albert Lienhardt. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980 (fotorepreso). 141p. Ilus. de Arfoll. 22cm. ISBN 963 571 071 2. Utila fonto por kursekzercoj. Prezo: 13,80 gld.

Eduko kaj vivsignifo, J. Krishnamurti. Tr. Rubén Feldman González kaj Kribo. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1980. 40p. Mimeo. 21cm. Eseoj. Prezo: 2,40 gld.

Esperanta gazetararo en la mondo, Stanisław Rams. El la pola tr. Romuald Jałowicki. Kraków: Zeszyty Prasoznawcze, 1973. 22p. Ilus. 22cm. Prezo: 1,50 gld.

Esperanto keele fakultativkursus koolidele, J. Palu. Tallinn: Eesti NSV Haridusministeerium, 1980. 125p. 20cm. Prezo: 6,00 gld.

Esperanto-vortaro per temo-tabeloj, Michele Mariano. Ascoli Piceno: Gabrielli (Plejado), 1980. 12+142p. 30cm. Scienca eldon-serio 1. Provo sisteme ordigi Esperantajn terminojn; speco de laŭtema vortaro. Prezo: 26,40 gld.

Faraono, La (1895), B. Prus (1847-1912). Adaptis Tibor Cs. Horváth. Desegnis Attila Fazekas. Laŭ la traduko el la pola (1907) de Kabe, la tekston kompilis V. Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 35p. Ilus. 24cm. ISBN 963 571 069 0. Bildstria rakonto pri potencolukto en la antikva Egiptio. Prezo: 4,80 gld.

Inter sovetaĵoj popoloj (1939-1946), Petro Diksztejn. 2 vol. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1981. 173+176p. Mimeo. 21cm. Aŭtobiografia historio de polo fuĝinta al Soveta Unio. Prezo: 12,00 gld.

Kampuĉio: La nigraj jaroj, Vu Kan kaj Hoang Nguyen. Hanojo: Vjetnama Kuriero/Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 1979. 155p. Ilus. 19cm. Pri la periodo 1975-1979. Prezo: 3,00 gld.

Kiel verki kaj traduki poemojn; Du studoj, K. Kalocsay (1891-1976). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 27p. 21cm. ISBN 963 571 074 X. "La esperanta rimo" kaj "Pri la esperanta ritmo". Prezo: 1,80 gld.

Lingvaj obstakloj en la interpopola komunikado; Evoluoj kaj solvoproblemoj, Jerzy Uśpieński (1928-). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1979. 16p. 21cm. Prezo: 2,40 gld.

Lucrari practice de Esperanto-interlingvistica. Red. Ignat Florian Bociort. Timișoara: Universitatea din Timișoara, 1980 (2a eld.). 298p. Mimeo. 24cm. Enkonduko al Esperanto por universitatoj. Multaj legaĵoj, vortaroj Esperanta/rumana kaj rumana/Esperanta. Prezo: 18,00 gld.

Memvola servuto (1553), Etienne de La Boétie. El la franca tr. Rol. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1980 (represo). 32p. Mimeo. 21cm. Eseo pri la politika libero. Prezo: 1,80 gld.


Naŭ jaroj en la infero; Travivaĵoj de bulgara antifaŝisto, Naĉo Kemalov. El la bulgara tr. Ivan Kovačev. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 111p. 20cm. ISBN 963 571 072 0. Prezo: 12,00 gld.

Vero pri la vjetnam-ĉinaj rilatoj dum tridek lastaj jaroj, La. Hanojo: Ruĝa Rivero (Fremdlingva eldonejo), 1980. 110p. Ilus. 19cm. Prezo: 3,00 gld.

Vojaĝo al Faremido / Kapilaro (1916, 1921), Frigyes Karinthy (1887-1938). El la hungara tr. Lajos Tárkony kaj Andreo Szabó. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 182p. 18cm. ISBN 963 571 045 3. La kvina kaj sesa vojaĝoj de Gulivero. Prezo: 13,80 gld.

Zamenhof: Life of Zamenhof, The (1920), Edmond Privat (1889-1962). El Esperanto tr. (1931) Ralph Elliott. Bailieboro: Esperanto Press, 1980 (4a eld., kun pliampleksigita fotosekcio). 160p. Ilus. 16cm. ISBN 0 919186 08 4. Kun bazaj informoj pri Esperanto kaj la Esperanto-movado. Prezo: 7,80 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,- gld.**



(Re)aperis: *Plena analiza gramatiko de Esperanto*

Vi eble komencis miri, kial la Libroservo de UEA tiel malmulte kaj malofte reklamas ĉi tiun verkon. Nu, ekzistas verkoj, kiuj apenaŭ bezonas reklamadon. Ŝajnas, ke *Plena analiza gramatiko de Esperanto* estas unu el tiaj verkoj. Kiel alie klarigi la fakton, ke en tri monatoj jam vendiĝis pli ol 800 ekzempleroj de libro kies stoko grandparte estas ankoraŭ survoje inter Pekino kaj Roterdamo?

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901 -). Rotterdam: UEA, 1980 (4a laborita eld.). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Prezo: 48,00 gld. (por Nederlando 49,92), plus sendokostoj.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

LABORTENDAROJ:

Kie oni povas utili ferie?

LA 28an DE MARTO aperis 8-paĝa informilo de TEJO *Labortendaroj 1981*, redaktita de M. Haase (FR Germanio). Pri labortendaroj ni jam skribis en nia januara numero (p. 14). La nova informilo ne celas unuavice la esperantistojn. Tial ĝi aperos en tri versioj: angla, franca kaj Esperanta. Tiamaniere centoj da neesperantistaj gejunuloj, kiuj nun planas siajn ĉi-jarajn feriojn, povos konsideri partoprenon en labortendaro, kie troviĝas esperantistoj aŭ kie oni povas eklerni Esperanton. La celo de ĉio ĉi estas proponi Esperanto-kurson al gejunuloj, post mateno da fizika laboro. Tiuj kursoj okazos sub arbo, apud rivero, en tendo — do, ĉiukaze en aparta kaj alloga etoso. Tute bonvena estas ankaŭ la reapero de la populara lernolibro de TEJO — *Ĉu vi parolas tendare?* —, pri kio vidu la ĉi-kunan anoncon.

Grava novaĵo pri la informilo estas, ke ĝi ne prezentas nur la labortendarojn organizatajn de esperantistoj. Fine oni komencas veni al la ideo, ke estas pli efike kaj malpli laborige proponi Esperanto-kurson (kaj kursgvidanton) al la ekstermovadaj organizantoj de la labortendaroj. Tamen, por realigi tion TEJO devus havi disponeblajn kursgvidantojn en kelkaj landoj. Se vi opinias, ke vi povus instrui Esperanton en labortendaro, bonvolu skribi al: H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

Jen resumo de la ĉefaj labortendaroj prezentitaj en la informilo:

Bulgario: Internacia Esperantista Laborbrigado Arkeologia (IELBA), en Dobrodan kaj Debnevo, inter la 13a

de julio kaj la 6a de aŭgusto. Oni laboros sep horojn tage pri arkeologia fosado. Libertempe okazos ekskursoj, diskutoj, muzikvesperoj. Nur parolkapablaj esperantistoj partoprenu, ĉar oni ne antaŭvidas kurson por komencantoj. La partopreno estas senpaga. (IELBA, Poŝtkesto 29, BG-5500 Loveĉ, Bulgario).

Francio: La Muelejoj de la Metilernantoj, Creuse, dum aŭgusto. Oni rekonstruos kvin malnovajn akvo-muelejojn. La restado kostas 25 francajn frankojn tage, kaj necesas kunporti dormosakon. La organizanto de ĉi tiu labortendaro estas neesperantista asocio, kiu jam de multaj jaroj simpatie rilatas al la Internacia Lingvo kaj en unu el siaj muelejoj regule organizas Esperanto-kursojn. Ni skribis pri ĉi tiu labortendaro en nia numero de novembro 1979 (p. 194). (Moulins des Apprentis, F-23220 Bonnat, Francio; eblas skribi same al la supre indikita adreso de H. Bakker).

FR Germanio: La 2a Internacia Laborbrigado de GEJ, Schlüchtern, inter la 28a de junio kaj la 11a de julio. Kvar horojn ĉiutage oni laboras pri renovigo de bona domo. Loĝigo kaj manĝado estas senpagaj. Bonvenus kunporti dormosakon. Ĉi tiu labortendaro antaŭvidas Esperanto-kurson por komencantoj. (Eki Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster, FR Germanio).

Hungario: La 3a Centra Internacia Esperanto-Laborbrigado (CIEL) de HEJ, Harta. Okazos pluraj dusemajnaj laboretapoj, kiujn ĉiam sekvos senpaga ripoz-semajno ĉe la lago Balatono aŭ aliloke. Sephora taga laboro estos agrikultura. Pluraj ekskursoj, sportaj kaj kulturaj programoj estas planitaj. Nur parolkapablaj esperantistoj, 16- ĝis 25-jaraj povas partopreni. (Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto).

Pollando: La 2a Internacia Junulara Esperantista Laborbrigado (IJEL), Bjalistoko. Ĉi tiu labortendaro okazos inter la 13a kaj 31a de julio. Simile al la hungara aranĝo, ne estas planitaj kursoj por la komencantoj de Esperanto. Antaŭvidite estas, ke oni laboros sep horojn, prizorgante herbejojn kaj florbedojn. Kvankam oni tranoktos en lernejo, necesas kunporti dormosakon. La partopreno estas senpaga. Povas aliĝi nur parolantoj de Esperanto, aĝaj 18 ĝis 26 jarojn. (PEA, Filio en Bjalistoko, skr. poczt. 67, PL-15-950 Białystok).

La informilo *Labortendaroj 1981* prezentas ankaŭ du elstarajn japanajn aranĝojn: la 14a Tutlanda Kunloĝado en Yaizu, komence de majo, kaj la 13a Friska Lernejo, apud la lago Biwa, en aŭgusto. Menciigis ankaŭ la konata trisemajna Esperanto-kursaro ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko (Usono) kaj kelkaj regulaj kulturaj aranĝoj en Eŭropo, kiel en Grésillon (Francio) kaj La Chaux-de-Fonds (Svislando).

La apero de ĉi tiu informilo estas signo de reaktiviĝo de la labortendara fako de TEJO. Tio fakte estas plenumo de unu el la konkludoj de la pasintjara seminario de TEJO en Strasburgo, kie oni pledis, ke la informlaboro inter la gejunuloj aparte emfazu la eblojn de la praktika utiligo de Esperanto. Prava estas ankaŭ la decido, ke la nacilingvaj eldonoj de ĉi tiu informilo multoble superu la Esperantan eldonkvanton. **smg**

FINFINE, DENOVE ESTAS HAVEBLA ĈI TIU POPULARA LERNOLIBRO DE TEJO!

Ĉu vi parolas tendare?, de Renato Corsetti kaj Mauro la Torre. Roterdamo/Sarajevo: TEJO/Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980 (3a eld., fotoreprezo). 64+27p. Ilus. 20cm. Prezo: 5,10 gld. Triona rabato ĉe la Libroservo de UEA ekde minimume 3 ekzempleroj.



LA ĈARTO DE UNUIGINTAJ NACIOJ

Aŭstralio

- De la 2a ĝis la 10a de januaro 1982 okazos la 23a kongreso de Aŭstralia Esperanto-Asocio en Adelaide (suda Aŭstralio). Kiel tradicie, la kongreso aparte bonvenigus eksterlandajn esperantistojn kaj limigas ilian kotizon al la restadkosto. Pliajn informojn provizas s-ro Bob Felby, 11 Clare St., Athol Park, S.A. 5012, Aŭstralio.

Italo

- En februaro okazis la jarkunveno de Grupo Esperanto Verbanja. Paroladon faris la urbestro, kaj Esperanto-diplomoj iris i.a. al ses urbaj policianoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la franca ĝemelurbo Romans sur l'Isère.

Usono

- Ĉiuj membroj de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) kaj Kanada Esperanto-Asocio (KEA) lastatempe ricevis enketilon pri sta-

rigo de kultura kaj feria centro de
 nordamerikaj esperantistoj. Temas
 pri iniciato de Mark B. Weddel (P.O
 Box 1042, Indian Rocks Beach, FL
 33535, Usono) kaj Trefflé Mercier
 (4248 Varennes, Rock Forest, Qué-
 bec, Kanado J0B 2J0), kiun ŝajne
 subtenas ankaŭ ELNA kaj KEA. La
 plano antaŭvidas aĉeton de bieno en
 Florido kaj instalon de centro simila
 al tiuj jam ekzistantaj en Grésillon
 (Francio), Pisanica (Bulgario) kaj La
 Chaux-de-Fonds (Svislando). Se la
 reagoj al la enketo estos pozitivaj, la
 Esperanto-domo ekfunkcios jam en
 1982.

Francio

- La 22an kaj 23an de marto, en la Kolegio "Albert Camus" en Perpignan okazis du provkursoj de Esperanto dum la oficialaj lernejoj. Ĉiuj lernantoj ricevis la bazan lernolibreton *Espéranto: Une approche de la langue internationale*, kiun eldonis Unuiĝo Franca por Esperanto. La provlecionojn en la menciita ler-

En 1979 la Oficejo de Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko reeldonis en Esperanto, laŭ kontrakto kun UEA, la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Statuton de la Internacia Kortumo. Nur fine de 1980, tiu 35-paĝa libreto fariĝis havebla. Unuiĝintaj Nacioj pagis la preskostojn, kaj UEA konsentis prizorgi la distribuadon. La Centra Oficejo donos ekzemplerojn de la libreto senpage al vizitantoj, kaj akceptos mendojn kontraŭ pago de la sendokostoj. Por unu aŭ du ekzempleroj bonvolu pagi 2 internaciajn respondkuponojn, por 10 ekzempleroj 6 irpk., por 50 ekzempleroj 15 irpk., kaj por 100 ekzempleroj 25 irpk. (1 irpk. = 0,85 gld.) Livero de pli grandaj kvantoj al kongresoj aŭ landaj asocioj estas ebla; interesitoj bonvolu skribi al la CO.

nejo faris René Llech-Walter, honora prezidanto de la franca landa asocio kaj, spite al sia alta aĝo, prezidanto de la organiza komitato de la 73a Franca E-Kongreso en junio ĉi-jare.

**Vi ne rezistos la tenton aĉeti tiun ĉi libron poste – antaŭmendu do ĝin nun je favora prezo!
Ĉefverko '81:**

TUTMONDA SONORO

de K. Kalocsay

581 poemoj de 185 poetoj, verkintaj en 30 lingvoj! Du binditaj volumoj, sur 700 paĝoj!

K. Kalocsay



TUTMO
SONOR

Poezia anteaŭ
en Esperanto
tradukita el

K. Kalocsay



TUTMONDA SONORO

Poezia antologio
en Esperanto
tradukita el 30 lingvoj

Prezo: 66,00 gld. Ĝis 1981 06 30 eblas antaŭmendi ĝin pagante nur 54,00 gld., kio inkluzivas ankaŭ sendokostojn! Kiel antaŭpago?

1. Tiuj, kiuj posedas konton ĉe la CO de UEA, simple per UEA-pagilo ĝiru 54 gld. al la konto numero 2628 de Hungara Esperanto-Asocio, kaj samtempe sendu sian adreson kun la "Kopio por informo" al HEA (Eldona Sekcio), Pf. 193, H-1368 Budapeŝt.
2. En kelkaj landoj funkcias perantoj:
Finnlando: S-ro Lasse Kivistö, Kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51
Hispanio: Heroldo de Esperanto, ĉe Banco de Bilbao, ag. 29, Madrid 16, cta 43 492 00 6727
Japanio: S-ro Mine Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO, Hyogo-ken, 671-01
Nederlando: Eldonejo TK-Stafeto, n-ro 4174498
3. El ĉiuj landoj oni povas pagi al la jenaj kontoj:
Belgio: Eldonejo TK-Stafeto, Bruselo n-ro 000-0422856-33
Heroldo de Esperanto, Bruselo n-ro 000-0078887-26
FR Germanio: Heroldo de Esperanto, Köln n-ro 194943-504

La libro aperos en oktobro 1981. Ĉiuj antaŭpagintoj en Eŭropo ricevos ĝin ĝis la fino de oktobro, en aliaj kontinentoj ĝis la fino de decembro! Ĉar nepras havi ĝin, valoras antaŭmendi!

FERIADO EN MALTO, MEZE DE MEDITERANEO

Por celebri la 20an datrevenon de sia fondiĝo, Esperanto-Societo (Malto) okazigos

INTERNACIAN TURISMAN SEMAJNON

de la 1-a ĝis la 7-a de septembro 1981. Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe: Esperanto-Societo (Malto), "La Espero", New Street off Qormi Road, St. Venera, Malto.

preta formo. La aŭtoro nun serĉas eldonejon aŭ eldonrimedojn por la pli ol 500-paĝa verko. Interesitoj petu specimenan paĝon de s-ro Georgo Abraham, Avenida Alem 62, RA-2600 Venado Tuerto, Argentino.

Periodaĵoj

- Per sia 360a numero (februaro 1981), *La movado*, monata, ĉefe japanlingva organo de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj tri aliaj distriktaj organizaĵoj en Japanio, finas siajn unuajn tri jardekojn, festante i.a. per speciala suplemento tute esperantlingva. Alia revuo tre ligita al la "kansaja skolo", la literatura kajero *L'omnibuso*, per sia 90a numero (oktobro/decembro 1980) "sin tiras en garaĝon," kiel diras adiaŭa poemo. Ekde majo 1964 ĝi aperigis centojn da poemoj, noveloj kaj eseoj, ne nur de japanaj verkistoj.

- *La espero*, sveda Esperanto-revuo, kiu ekzistas jam 68 jarojn, ĵus ŝanĝis sian formaton kaj samtempe ankaŭ la enhavon, kiu nun (n-ro 1/1981) ampleksas ankaŭ sciencajn suplementojn, kun sufiĉe varia temaro. Sveda Esperanto-Federacio, kiu antaŭ kelkaj monatoj instaligis en nova oficejo, centre de Stokholmo, nun mem kompostas kaj presas sian revuon. La redaktoro de *La espero* estas Franko Luin.

Turismo

- Dek ses usonaj geesperantistoj faros grupan vojaĝon tra Ĉinio ekde la 3a de majo ĉi-jare. La grupo, kiu vojaĝas laŭ invito de Ĉina Esperanto-Ligo, havos esperantlingvajn turismajn gvidantojn kaj vizitos plurajn ĉinajn urbojn. Ĉie estas planita renkontiĝo kun lokaj Esperanto-grupoj.

Tabulludoj

- Esperanta Ŝak-Ligo Internacia organizas perkorespondan ŝakludadon, kaj jam komencis sian trian teamturniron. Interesitoj povas skribi al la organizanto, s-ro Horst Kirmse, Naumburger Str. 23, DDR-6900 Jena 7, Germana DR. Ekzistas ebleco, ke ŝakturniro okazos en la kadro de la 66a UK en Brazilio, simile al tiu en Varno en 1978.

- Go-ludantoj, kiuj vizitos Tokion, nepre lasu libera la duan merkredon de la monato, kiam Japania Esperantista Go-Asocio kunvenas por batali goe en la Akademia Domo de Kanda.

Lingva diskriminacio

- Laŭ decido en federala kortumo, la manko de hispanlingva edukado preter la tria lerneja jaro en Teksaso (Usono) estas lezo al la garantioj pri egala protektado en la usona konstitucio. Laŭ la decido, Teksaso devos urĝe plani dulingvan edukadon sur ĉiuj niveloj de la publika lerneja sistemo. La decido povus havi sekvojn ankaŭ por multaj aliaj partoj de Usono, kie loĝas signifa proporcio de hispanlingvanoj.


Tradukoj

- En la nederlanda literatura revuo *De tweede ronde* (La dua rondo) de printempo 1981, aperis la konata poemo de William Auld, "Ebrio", en traduko de W.A. Verloren van Themaat.

Vortaroj

- Ĵus venis informo, ke la araba-Esperanta vortaro, kiun prilaboras Georgo Abraham de Argentino jam de 25 jaroj, nun ekzistas en pres-

Fake



- **Fervojistoj:** De la 15a ĝis la 21a de majo 1981 la germana urbo Regensburg (sur la foto) gastigos la 33an kongreson de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF). La kongresanojn elsupozeble 20 landoj atendas krom fervojfaka kadro riĉa kultura kaj turista programo, i.a. altkvalita koncerto, folklora kaj magia vesperoj, tri ekskursoj per aŭtobusoj kaj ŝipoj, lingvaj instruado kaj ekzamenoj. Aliĝi eblas ĉe: 33a IFEFF-kongreso, Wiener Strasse 121, D-600 Frankfurt (Main) 70, FR Germanio.

Informadiko

• El Rennes (Francio) venas la iniciato okazigi koresponde la unuan Kolokvon pri Komputoriko, kiun organizas CCETT (Komuna Esplor-Centro pri Elsendado kaj Telekomunikado), sub aŭspicio de UEA. La

Kolokvo nun alvokas referaĵojn pri diversaj informadikaj temoj. La referaĵoj devas esti pretaj antaŭ la fino de junio ĉi-jare. Informilo estas havebla ĉe s-ro C. Bertin VRE/TDP, CCETT, B.P. 1266, F-35013 Rennes Cédex, Francio.



Persone

Damjanov

• La bulgara kantisto Veselin Damjanov koncertos en Perpignan (Francio) dum la 73a Franca Esperanto-Kongreso, inter la 6a kaj 9a de junio ĉi-jare. Damjanov, kies tria Esperanto-disko aperis antaŭ nelonge, koncertis dum la lastaj monatoj ankaŭ en aliaj landoj, i.a. en Paderborn (FR Germanio) fine de novembro 1980.

Piron

• Oni ne scias, ĉu pli multas la prelegoj kaj artikoloj de Claude Piron pri Esperanto aŭ la originalaj romanoj de Johán Valano en tiu sama lingvo. Vi ja informiĝis, ke ĵus aperis la nova romano *Ĉu li venis trakosme?* Sed vi verŝajne ne aŭdis, ke Piron antaŭ nelonge estis en sia naskiĝlando Belgio (li vivas en Svislando) kaj tie la 10an de marto prelegis en la Universitato de Lieĝo pri la lingvistikaj trajtoj de Esperanto. En julio ĉi-jare Piron instruos Esperanton en la Ŝtata Universitato de San-Francisko (Usono).

Birch Olsen

• S-ino Sigrid Birch Olsen, kiu vivas apud Sarpsborg (Norvegio), festis en marto ĉi-jare la 70an datrevenon de sia esperantistiĝo. Pro sia multjara aktiveco en la Movado, ŝi ricevis la medalon "Pro Merito" de Norvega Esperantista Ligo. Oni opinias, ke s-ino Birch Olsen estas la plej malnova esperantisto en Norvegio.

Maul

• Stefan Maul, ĉefredaktoro de *Monato*, internacia magazino eldonata de TK/Stafeto, vizitis la Centran Oficejon de UEA meze de marto ĉi-jare. Tiu vizito okazis dum la estrarkunsido (v. la paĝon 62) kaj Maul povis interŝanĝi opiniojn (i.a. pri *Monato*) kun pluraj estraranoj. Pli frue, en januaro, Maul faris 9-

tagan prelegvojaĝon tra Japanio, kun la celo varbi pliajn abonantojn por tiu unika esperantlingva periodaĵo.

Sadler

• En la unua duono de marto, d-ro Victor Sadler, la ĝenerala direktoro de UEA, vojaĝis al Kanado kaj Usono; fine de marto li iris al FR Germanio kaj Hungario. Li revenis el Budapeŝto la 31an de marto, por

jam la postan tagon forflugi tra Maroko al Brazilo. Kompreneble, temas pri profesiaj vojaĝoj ligitaj al la oficejoj de UEA en Budapeŝto kaj Nov-Jorko, pri la preparoj por la ĉi-jara kaj venontjaraj Universalaj Kongresoj. Nu, se vi ie renkontos d-ron Sadler (rekonebla laŭ la foto), salutu lin de la roterdamaj oficistoj de UEA, kiuj malofte vidas lin lastatempe.

Oficiale Informilo

N-ro 544

SOCIETO ZAMENHOF 1981

BELG: 136 Grégoire Maertens. BRAZ: 137 Antônio de Souza Barbosa; 138 Carlos Henrique Dionisio. FINNL: 139 Niilo Kavenius. FR GERM: 140 Helmut Welger. JUG: 141 Jožica Židanik. NED: 142 Ru H. Bossong. SVED: 143 Erik Carlén. US: 144 Humphrey Tonkin.

DONACIOJ 1981 (Gld.) ĝis la 28a de februaro

ASOCIA KAPITALO: Britio: Heredaĵo A. Kinghorn 6 509,08. Sumo ĉi-jara 10 549,08.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Japanio: Japana Pacdefenda Esperanto-Asocio 2 000,00. Sumo ĉi-jara 2 018,72.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO: Japanio: T. Huĝimoto 333,20.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Finnlando: N. Kavenius 89,15. Sumo ĉi-jara 1 089,15.

FONDAĴO TEJO: FR Germanio: Auslandinstitut 45,92. Nederlando: O. Hoekstra 250,00; G. Peet 50,00. Svedio: J.-O. Svensson 51,12. Sumo ĉi-jara 397,04.

ĜENERALA KASO: Francio: R. Lemaire 65,87. Nederlando: O.

Hoekstra 250,00. Diversaj malgrandaj 4,27. Sumo ĉi-jara 4 367,57.

NOV-JORKA OFICEJO: Patronoj (minime \$100): Aŭstralio: Ralph Harry. Kanado: Charles Carson; Dorothy Hawley (\$200); Kanada Esperanto-Asocio. Usono: Wm. Dale Brown; Ella H. Gibson; Thomas H. Goodman; Walter kaj Monika Kim; Conn kaj Mary Murray; Esperanto-Asocio de Portland (Oregon); Hiram Elwin Reed; William Simpson; Mark Starr; Paul Stein; Robert kaj Ann Swenson; Bern Wheel. Amikoj (minime \$10): Italio: Renata Bonvicini. Kanado: Crawford Baker (\$15); G. Ewart Brown (\$83); Frank G. Hamsom. Svedio: H. Karlsson. Usono: Cleo J. Fort; Joseph kaj Maria B. Hackenberg; Horace Hand (\$20); Cecilia Peterson (\$50); Irving Shanker; Norman Shapiro (\$20); Donna Stitz; Harold kaj Adele Wesson (\$25); Marie Zimmerman. Sumo ĉi-jara: 4 571,98 gld.

PATRONOJ DE TEJO: 19 H.M. Schippers, Nederlando. 20 O. Hoekstra, Nederlando. 21 S. Assunção, Brazilo. 22 M. Imai, Japanio. 23 J. Tacumi, Japanio. 24 M. Landmark, Norvegio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

FRANK MERRICK (1886-1981), konata koncertpianisto kaj komponisto, honora prezidanto de Londona Esperanto-Klubo, mortis la 19an de februaro. Enkarcerigita kiel militrifuzanto dum la unua mondmilito, Merrick ekstudis la Internacian Lingvon kiam, petinte libron pri arkitekturo aŭ la latina, li erare ricevis Esperanto-lernolibron. Li fariĝis entuziasma movadano, kaj en 1944 aperis *Muzika terminaro*, kiun li kunverkis kun M.C. Butler. Li verkis tridekon da kantoj en Esperanto, kaj ofte pianludis akompane al ili, i.a. ĉe la 56a UK en Londono. En 1978 li ricevis la britan ordenon "CBE" (Komandanto de la Brita Imperio).

NILS JOHAN MATLAND (1919-1981) forpasis la 10an de januaro en Sauda (Norvegio). Esperantisto ekde junaĝo, li aktive partoprenis la Movadon je loka kaj landa niveloj, kaj koniĝis kiel originala kaj traduka poeto.

MATEJ PAVLETIĆ, la plej aĝa loka esperantisto, forpasis en februaro, en Zagrebo (Jugoslavio), pli ol 90-jara.

BOŽO SABLJIĆ (1931-1981), dumviva membro de UEA kaj fakdelegito pri veterinaraj aferoj, mortis la 28an de februaro en Osijek (Jugoslavio).

RODOLFO GARCÍA LÓPEZ (1899-1981), kiu dum tridek jaroj servis kiel delegito de Montevideo, forpasis lastatempe.

SEBASTIÀ CHALER ARNAU (1883-1981) mortis, en Terrassa (Hispanio), kie li estis delegito de UEA, la 27an de januaro. Grandparte dank' al liaj klopodoj restariĝis la hispana Esperanto-movado post la dua mondmilito, tiel ke landa kongreso povis okazi en 1951. Li daŭre gvidis kursojn kaj kunfondis la lokan societon en Terrassa.

MARIE BONAFOUS (1901-1980) forpasis la 28an de decembro en Aix-en-Provence (Francio). Esperantisto jam de la junaĝo, ŝi utiligis la lingvon en diversaj mondogrupoj, i.a. en Ĉinio, kie ŝi laboris du jarojn kiel tradukisto kaj kie ŝi persone renkon-

tiĝis kun Maŭ Zedong kaj Ĝoŭ Enlaj. Konata poetino en la provenca kaj la franca, ŝi estis membro de pluraj gravaj kulturaj organizaĵoj. Ŝia franclingva poemaro *La reĝa aglo* (1977) ricevis "kronpremion" de la Franca Akademio.

ANNA DRATWER (naskita Bajer) subite mortis la 17an de marto 1981 en Bat Jam (Israelo). Ŝi esperantistiĝis antaŭ pluraj jardekoj en Pollando (kie ŝi antaŭe vivis) kaj restis fidela al la Movado. Dum multaj jaroj ŝi estis membro kaj fakdelegito de UEA.

HJ. ALDERIN LEIJDER (1906-1980), multjara membro, fakdelegito pri ŝosekonstruado, mortis en Ljungsbro (Svedio) pasintjare.

PETER A. JUD (1894-1980), kiu ekde 1956 servis kiel delegito de Kaltbrunn (Svislando) kaj fakdelegito pri astronomio, tie forpasis.



DÁVID BUJDOSÓ (1975-1981) forpasis post subita malsano la 10an de januaro en Budapeŝto. Denaska esperantisto, li partoprenis plurajn internaciajn Esperanto-arangojn, inkluzive de la 16a Internacia Infana Kongreseto en Varno (1978).

CLIFFORD GOOCH (1931-1981), ĝenerala sekretario de Bristola Esperanto-Societo dum pluraj jaroj, mortis en Bristol (Britio) meze de januaro.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 41

(pri la demando vidu nian martan numeron)

a. La unua esperantisto en Brazilo estis Rūdolfs Libeks (1853-1908), latva instruisto el Rigo. Li estis pioniro de Esperanto en sia naskiĝlando kaj verkis la unuan lernolibron por latvoj en 1889. Li elmigris al Brazilo en 1890.

b. La dua esperantisto en Brazilo estis la ĉeĥo František Vladimír Lorenc (1872-1957). Ankaŭ li rolis kiel esperantista pioniro. La unua lernolibro por ĉeĥoj, kiun li verkis, estis eldonita en 1890. Li forlasis sian hejmlandon en 1893 kaj, alveninte samjare al Brazilo, li portugaliĝis sian nomon jene: Francisko Valdomiro Lorenz.

c. La tria esperantisto en Brazilo, kaj la unua brazilano, kiu esperantistiĝis, estis d-ro Jácome Martins Baggi de Araujo (?-1912), supera juĝisto en la ŝtato Rio-de-Janeiro. Li eklernis la Internacian Lingvon en 1896, korespondis, verkis gazetartikolojn kaj fondis la Esperanto-grupon de Petrópolis.

ĉ. La 30an de novembro 1906 estis publikigita dekreto en la telegrafia bulteno *Boletim Telegráfico* deklaranta, ke Esperanto estas akceptita kiel klara lingvo (t.e. ĝi estas nek kodo nek kriptajo) por telegramoj en la enlanda servo de Brazilo.

d. La libro eldonita de la muzeo "Domo de Rui Barbosa" estas biografio eseo pri senatano Rui Barbosa (1849-1923). Li estis juristo, oratoro kaj verkisto, kiu kontribuis al la proklamo de la respubliko de Brazilo en 1889 kaj estis unu el la sep membroj de la provizora registaro (1889-1891).

e. La brazila esperantisto Leopold H. Knoedt esperantigis versojn de Antônio de Castro Alves (1847-1871) por la libro *Elektitaj poemoj*, eldonita en Rio-de-Janeiro en 1959.

f. *Iracema* estas la nomo de romano de José Martiniano de Alencar

S-INO E. HARBOTTLE, 21 LITTLE RUSSELL STREET, LONDON, WC1, BRITUJO.

1. La Abolicion de Nukleaj Armiloj kaj ĉiuj Armiloj por Amasdetruo
2. La Abolicion, laŭ konsentitaj stadioj, de Konvenciaj Armiloj, kio konduku al:
3. Ĝenerala kaj Kompleta Malarmado
4. Transigo de Pormilita Elspezado al la Tutmonda Forigo de Malriĉeco.

[illegible]

(1829-1877), kiu estis publikigita la unuan fojon en 1865. Benedicto Silva tradukis la verkon en Esperanton, kaj ĝi estis eldonita en Rio-de-Janeiro en 1974.

g. "Bona Espero" estas eduka centro situanta en subtropika regiono norde de la ĉefurbo Brazilio. Ĝi estas parte subtenata de esperantistaj volontuloj. La celo de "Bona Espero" estas eduki infanojn kaj disvolvi la agrikulturon de la regiono.

ĝ. De la 17a ĝis la 24a de julio 1978 okazis la Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto en la brazila urbo Marília, 480km. nordokcidente de San-Paŭlo. La kongreso estis sub aŭspicio de UEA kaj ricevis subtenon ankaŭ de la urbaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj.

h. La spiritismo: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz en Rio-de-Janeiro, kaj Federação Espírita Brasileira (Brazila Spiritisma Federacio), Rio GB.

DEMANDO 42

(la respondo aperos en nia junia numero)

La Ekzota Restoracio en Verdurb, kiel ĝia nomo indikas, proponas al siaj klientoj kun tre rafinita gusto la plej palat-tiklajn manĝaĵojn el foraj regionoj. La ĉi-monata demando ekzamenas vin rilate vian gastrono-

mian scion. Jen dek difinoj ĉerpitaj el la restoracia menuo. Ĉu vi scias, kiel nomiĝas la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en Esperanto?

Supoj

- a. Rusa acideta supo el betoj.
- b. Provenca supo el rokfiŝoj, prezentita kun safranaj pantranĉoj kaj ajlolea saŭco.

Ĉefpladoj

- c. Hinda manĝaĵo, konsistanta el kokido kaj rizo spicita per pulvorigita pimento kaj kurkumo.
- ĉ. Araba manĝaĵo, preparita per milio kaj raguo el ŝafviando.
- d. Orienta manĝo el rizo boligita en akvo, miksa kun ruĝa pipro kaj rostita viando kokina, porka aŭ ŝafa.
- e. En Japanujo, fiŝoj, salikokoj, legomoj, frititaj en pastaĵo.

Deserto

- f. Konfitaĵo el bakita miksaĵo de amelfaruno, sezama aŭ sunflora oleo kaj sukero.

Trinkaĵoj

- g. Fermentinta acida ĉevalina lakto.
- ĝ. Aroma, tre stimula teo, preparata per folioj de diversaj specioj de ilekso, precipe *Ilex paraguayensis*.

Drinkaĵoj

- h. Orienta brando, distilita aŭ el kokoso, aŭ el fermentinta rizo.



Pri ceramikaĵoj deziras korespondi: Hortensio, Junhi-ĉe, Yeokchandong 32-37, Eunpyangku, Seoul, Koreujo.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Senpage gastigos ĉiun eksterlandan esperantist(in)on f-ino Dorota Jurkin (19-jara), str. Makuszyńskiego 5, Białystok, Pollando.

Pri la vortordo en la traduko de *Kalevipoeg* korespondis d-ro W.A. Verloren van Themaat (Volkerakstr. 38/I, 1078 XT Amsterdam, Nederlando) kaj la tradukinto, Hilda Dresen. Fotokopioj de tri leteroj estas haveblaj ĉe la menciita adreso kontraŭ 1 respondkupono.

Letertagon ni aranĝas la 20an de septembro kaj petas bildkartojn el la tuta mondo. Antaŭdankas Klub Esperanto, SKP ROH Slezan, CS-73802 Frýdek-Místek, Ĉeĥoslovakio.

26-jara profesoro pri biologio deziras interŝanĝi kasetoj pri folkloro muziko tutmonde. Norberto Mollo, Asambleo 480, RA-6100 Rufino (Santa Fé), Argentino.

D-ro Hans Eichhorn atentigas pri nova adreso kaj ŝatus reaktivigi kontaktojn kun amikoj kaj konatoj: Faklinikon pri Psikiatrio/Neŭrologio, Ravensteiner Str. 23, DDR-2120 Neckermünde, Germana DR.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkupanon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

Mi deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Said Kamaly, 36 St. Mehr, kh. Kamaly, Karage, Irano.

Instruistoj! Gepatroj! Ĉu viaj infanoj ne volus partopreni Pupteatran Internacian Festivalon (7-11 oktobro 1981) en Jugoslavio? Taga prezo porinfana: 15 guldenoj. Informas Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Ĉe-kursoj necesas! Kurso tuj paroliĝa: *Esperanto laŭ la patrino metodo*. 320 paĝoj, DM 50,00. La kursokonversacio nur en Esperanto. August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61. Poŝtĉekkonto Hamburg 150 58-209.

Okulklinikon en Kamerunio konstruas esperantistoj. Informojn donas la iniciatoro de Agado E3, Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederl.

Kameruna esperantisto, mezaĝa, deziras korespondi tutmonde. Ankaŭ tre dankus pro alsendo de Esperantaj libroj kaj revuoj por baldaŭ fondota Esperanto-Centro. Jean-Marie Mboge-Mbele, B.P. 1816, Douala, Kamerunio.

Niaj 23 aktivaj membroj serĉas korespondantojn en la tuta mondo pri ĉiuj temoj. S-ro F. Seymour, E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj, P.O. Box 32, Mount Waverley, 3149 Aŭstralio.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (5a sesio)
UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO)
 05 - 19 de julio 1981

**S
U
K
,
8
1**

Petu detalajn informojn kaj aliĝilon ĉe:
SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ,
Boîte Postale 9, B - Liège X, Belgio.

Sekcio E: Ekologio

- 1-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Sociekonomia bazo de la nuntempa ekologia krizo
 2-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Ekologiaj disponfontoj por elnutrado de la loĝantaro

Sekcio P: Pedagogio

- 1-a semajno: H. FRANK (FR Germanio),
 Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva
 2-a semajno: P. DENOËL (Belgio),
 Elementoj de la homa fiziologio en rilato kun la edukado
 S. LEHRL (FR Germanio),
 Enkonduko en la informpsikologion kaj ties pedagogian aplikon

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj, kiuj okazas de lundo ĝis vendredo. Eblas sekvi unu aŭ plurajn kursojn, eĉ en ambaŭ sekcioj. Ekzamenoj. Kulturaj aranĝoj. Perfektiga Esperanto-kurso.

KOTIZOJ: Programkostoj (unu kurso dum unu semajno): 1 200 bf; studentoj 900 bf. Restadkostoj (sen tagmanĝoj; modifeblaj): ĉ. 2 500 bf semajne. Perfektiga Esperanto-kurso (semajne): 500 bf.

**PRI INTERNACIA LINGVO
 DUM JARCENTOJ**

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvistoj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribuanto: Libro servo de Universala Esperanto-Asocio.

La sola trivoluma (1300 paĝoj kun fotoj) movada kaj literatura

**HISTORIO
 DE ESPERANTO**

de L. Courtinat

Historio laŭ la kongresoj; recenzoj ĝis 1960. Mendebla ĉe UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, 50 ff plus afranko, aŭ ĉe la Libro servo de UEA.

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ **Esp/52**

Orienta filozofo skribis en "Oomoto" en 1979, ke la grandaj religioj ĉiuj promesas pacon al tiuj siaj kredantoj, kiuj ĝin alvokas de Dio. Paco estas harmonio. Sed la plej granda malharmonio dissendas ĝuste la religiojn mem; apenaŭ eblas starigi pacon inter ili. Li diris, ke tio okazas ĉar la religioj tro insistas pri la rilato vertikala — inter homo kaj Dio — kaj malsufiĉe pri la rilato horizontala — inter homo kaj homo. Iliaj misiistoj rigardas la varbadon de prozelitoj kiel la deziron de sia Dio. De tio originas la konstanta konflikto inter ili.


♦ **Esp/53**

La konstanta kaj esenca respondeco, kiu regas en la Superdemokratio, postulas, ke la juĝistoj NE asigu publikan rolon al homo kun malalta kapablo sin regi. Tiu faktoro haltigus la karieron de ĉiu homo kun malforta persona disciplino, kiel ajn kompetenta tiu estus alirilite. Jen la solvilo de ĉiu burokrata komplikajo. Ĝuste tio necesigas, ke la Etika Stabo konstante manipulu la famajn "bastonon kaj karoton". Al tiu Stabo estus subordigita ĉiu ajn civitano por la

esenca unueco de la homara orkestro. Al la sendisciplina homo mankas la matureco socia. Drasta sed necesa rimedo kontraŭ tiu manko, iugrade komuna al ĉiuj homoj, estas tia subordigado.

♦ **Esp/54**

La ĝisnunaj majstroj de la politika rabarto ĵaluze fermas la pordon kontraŭ la alproksimiĝo de la moralo, la vera scienco, la konkreta respondeco kaj — precipe — la saĝo. La Superdemokratio estas efektiva enkonduko de la menciitaj pozitivaj valoroj en la politikon, kiu postrestas dum jarmiloj, ĝis la epoko de la kaverna homo, kies glorioj estis de la plej kruda sovaĝeco. Nin instruu la hiroŝimaj atombomboj kaj la nazia genocido, kaj — ne malpli — la laŭslogane kontraŭmilitaj internaciaj organizaĵoj, kiuj konsistas el bronze farbita kartono kaj celas trompi la malsaĝan politikan klientaron. La neŭtraluloj ne faru al si iluziojn; ili drivas sur la sama barko kiel ni ĉiuj, kiel ĉiuj teranoj, kaj frontas la saman teruran danĝeron.



**MONDHARMONIIGA
 INSTITUTO,
 VIA SPORT 18,
 I-40065 PIANORO,
 ITALIAO**

Sekso kaj Egaleco

La tuto
regule tra-
dukata en
la japanan.

Artikoloj kaj leteroj pri
aktuala temo: la virina
agado por sek-
sa egaleco en
la socio kaj en la Espe-
ranto-movado.

Informoj kaj provnumero (3 irk.) haveblaj ĉe: Anna
Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197-B, 3021 GA
Rotterdam, Nederlando. Mendu ĉe UEA (jarabono:
14,50 gld.) aŭ petu detalojn pri naciaj perantoj rekte
ĉe Anna Brennan. Aperas kvarfoje jare.

**LA SOLA ESPERANTO-BULTENO KIU RE-
GULE APERAS ANKAŬ EN NACIA LINGVO**

Ĉu vi ŝatus profesie labori por Esperanto?

UEA serĉas novan oficiston por plenumi
unuavice kongresajn kaj turismajn labo-
rojn. Bezonataj kvalitoj estas iniciatemo,
administra kaj komerca talento, kapablo
bone rilati kun kunlaborantoj kaj repre-
zenti la Asocion ĉe eksteraj instancoj,
laŭeble sperto pri la vojaĝ-industrio, flua
scipovo de Esperanto kaj eventuale de
aliaj lingvoj.

Salajro estos interkonsentita. Posteniĝo
eblas ekde oktobro 1981. Sinproponoj
estu senditaj al la Direktoro de la Centra
Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



FLUGU KUN UEA AL LA 66a UK!

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la ĉi-jara Kon-
greso en Brazilio, petu kaj legu ĉi tiujn
prospektojn pri la flugprogramoj de
UEA! Prezoj de 3974 ĝis 5998 gld. Di-
versaj datoj, ekirpunktoj kaj flugvojoj,
inkluzive de kvinlanda rondvojaĝo tra
Sudameriko. Sed rapidu!

KIU ESTAS LA PLEJ FAMA KRIMINAL-VERKISTO?

Kia demando! Kompreneble
JOHÁN VALANO

Tion ja scias ĉiu. Sed ĉu vi scias ankaŭ, ke en
1981 vi povas legi kriminal-novelon de Johán
Valano en ĉiu numero de

MONATO

internacia magazino sendependa

Faru plezuron

al viaj korespondan-
toj kaj uzu la belan
glumarkon de la 66a

UK en Brazilio. Brile orkolora kaj memglua, kun
aspekto same modernisma kiel la brazila ĉefurbo
mem, ĝi tamen kostas nur po 8,80 (por Neder-
lando 10,24) gld. por 100 glumarkoj, inkluzive
de sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA
aŭ ĉe via kutima liveranto.

